MEGYEI KÖNYVT
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

5
1982
13,– Ft



Eldonejo *Műszaki* ofertas al la estimataj legantoj kaj fakuloj la subajn librojn en la hungara lingvo, necesajn por studado, amplleksigo de la konoj, kaj por la ĉiutaga laboro:

Barnabás Bárczy: Diferencialaj kalkuloj
28,- Ft

Barnabás Bárczy: Integralaj kalkuloj
36,- Ft

I.N. Bronstein — K.A. Semendjaev: Matematika poŝlibro
90,- Ft

d-ro László Zsombory: Lernolibro de la Trafika Kodo (KRESZ)
30,- Ft

Ervin Keller — Alajos Kalivoda — László Menczer: Ekzercoj por la ellerno de trafikreguloj
48,- Ft

Ervin Kovács: La tornisto (Industria Faklibraro) 45,- Ft

László Kovács: Poŝlibro de teknikistoj
89,- Ft

Vilmos Milley — István Völgyes: Centra hejtado I-II. (Industria Faklibraro) 62,- Ft

Gyula Obádovics J.: Matematiko
80,- Ft

Károly Opitzer (ĉefred.): Muntado de duktoj akva, kanalizacia kaj gasa I-II. (Industria Faklibraro) 94,- Ft

György Rábel: Poŝlibro de maŝinfakaj teknologiistoj
91,- Ft

Zoltán Ternai: Lernolibro pri aŭtomobila tekniko

La Eldonejo *Műszaki konvene al la pretendoj de la legantoj daŭre reeldonas la suprajn librojn.*

Ili konstante estas aĉeteblaj:

en Budapeŝto en la vendejoj de Ŝtata Librokomerca Entrepreno, en provinco en la vendejoj de la Librokomerca Entrepreno Klera Popolo kaj en tiuj de Kooperativa Librokomerca Entrepreno.

Mendojn oni sendu al:

Eldonejo *Műszaki*
Budapest I. 1014
Szentháromság tér 1.

ELDONEJO MŰSZAKI

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIa jaro, 1982 n-ro 5
(105)

ENHAVO

Szabó, I.: Por laŭdi belajn objektojn 162
Dudás, I.: Kiel loĝos homoj en la estonteco? 165
Tölgyesi, I.: „Kiskunság" Nacia Parko (*E.F.*) 166
Benczik, V.: De Kongreso al Kongreso... 168
Rosbach, J.H.: La portalo de Urnes 170
Szabó, I.: Sonoriloj 170
De Kock, E.: Gilgameŝ 170
Varga, J.: Virino 170
Benczik, V.: Pri la hungara agrikulturo 171
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 5. 172
Corsetti, R.–*La Torre*, M.: Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado 175
Panoramo 179
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 183
László, F.: La rolo de antaŭvido en la akvomastrumo (*E.F.*) 184
Bálint, Sz.: Mono en la kelo 190
Teatra Festivalo ripetiĝos! 191
Gaja paĝo (*E.F.*) 192
Kapitány, L.: La artisto de la librobindado 192
Recenzoj de Sz. *Bálint*, V. *Benczik*, E. *Fenyvesi*, G. *Mihalkov*, S. *Štimec*, I. *Szabó* 193
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 198
Leterkesto, Korespondi deziras 200

Sur la titolpaĝo: Mane brodita kaptuko el Departemento Nógrád (Foto de Z. *Fejér*)

Kiom da vere legindaj...

artikoloj troviĝas en unu revunumero, decidos nur la leganto, ĉiukaze, niaj aŭtoroj ankaŭ ĉifoje klopodis fari sian eblon por plaĉi al la multnacia legantaro.

La kontribuaĵoj pri la hungara popolarto kaj pri unu el niaj ĉefaj naciaj parkoj estas direktitaj precipe al la partoprenontoj de la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto. Tamen jam pli frue montriĝos okazo por veni al Budapeŝto: inter la 18-a kaj 27-a de marto, en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo denove enprogramiĝos Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Detalaj informoj pri ĝi legeblas sur la paĝo 191.

En la ĉarma urbeto Szentendre okazis tre interesa seminario pri la estonta loĝkulturo de la homoj. Ĝi rikoltis tre vastan reeĥon en la hungaraj amaskomunikiloj, kiuj neniam forgesis noti, ke unu el la aranĝantoj de la seminario estis TEJO.

Iom longa, sed proporcie ĝisfunda estas la studo de Renato *Corsetti* kaj Maŭro *La Torre* pri «Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado». Ĝi estas skriba formo de prelego, farita antaŭ tri jaroj, sed bedaŭrinde ĝis nun ĝi ne aperis presite, kvankam verŝajne ĝi estas la plej klara kaj kompleksa pritrakto de la temo. Nia Redakcio varme rekomendas ĝin legi ne nur al movadaj gvidantoj ĉiugradaj (por ili ĝi estas kvazaŭ «deviga legaĵo»), sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj volas koni ankaŭ la ideologian staton de la Esperanto-movado.

Ŝatantoj de literaturo nun devos kontentiĝi nur je paĝo da originala poezio. Tamen sur tiu ĉi paĝo legeblas ankaŭ «La portalo de Urnes» de la norvega poeto kaj verkisto Johan H. *Rosbach*, kiu poemo gajnis ĉi-jare unuan premion en la Belartaj Konkursoj. Oni trovas multajn recenzojn, kiuj raportas pri kelkaj vere valoraj libroj – kaj finfine iasence ankaŭ recenzoj estas literaturo, ĉu ne?

Troviĝas krome la kutimaj rubrikoj, iom malfrua raporto pri la ĉijara UK, artikolo pri la hungara agrikulturo, prezento de elstara libromajstro, finenda krimrakonto – espereble ĉiu trovos por si almenaŭ du-tri legindajn artikolojn.

Imre Szabó

Por laŭdi belajn objektojn

Ankoraŭ vivas inter ni kelkaj atestantoj de la iama prospero de la popolaj artoj. Nuntempe la belaj popolartaĵoj havas renesancon, sed tio estas diferenca disde la kulmino en la pasinta jarcento, kiam ili estis forte ligitaj al ĉiuj pli signifaj viveventoj. Hodiaŭ ni simple nur ĝojas pri ilia beleco, sed tiutempe ili enhavis kompleksajn mesaĝojn, vojmontrojn.

La popolartoj formas radikaron por la hodiaŭaj modernaj artoj, tamen ili multe malsamas: ne ekzistas striktaj limoj inter la artaĵoj kaj la uzobjektoj. La sistemon de la estetikaj principoj montras nur la kohera aro de ĉiuj objektoj, kiuj organike kompletigis unu la alian. Tiuj iamaj objektokompleksoj instruas al ni, kian rolon povas havi la artoj en la ĉiutaga vivo.

Mondo de objektoj

Oni opinias ĝenerale, ke la popolartoj klopodis nur ornami la ĉiutagajn uzobjektojn. Tio estas eraro! La plimulto de la uzobjektoj estas senornama. La ornamaĵo estas pluso, kiu plie valorigas la objektojn. Samtempe pro la troa ĉizado, brodado la objektoj fariĝas malpli uzeblaj, kaj la ornamaĵoj sur ili estas pleje ĝueblaj nur se ili estas kvazaŭ ekspoziciitaj en la loĝejo, kiel la teleroj surmure, aŭ la parada lito meze de la „bela ĉambro". La ĉiutage uzata lito modestas post kurteno kaj havas tre simplan litaĵon. Inter la opaj objektoj estas delikata hierarkio. La pli valora estas uzata festotage aŭ esceptokaze, ekzemple dum nuptofestoj, foiroj, kunvenoj de parencoj.

La ornamita objekto levas sian uzanton en pli altan sferon, ĝi havas ritajn, preskaŭ sorĉajn fortojn. Morta ĉemizo povas esti nur ĉemizo neuzita

Vestado de fianĉino En fono la parada lito

pli frue same, kiel fianĉa ĉemizo. El la duobla rolo de samtipaj objektoj rezultis, ke krom la ĉiutaga aperis la bela, la ornamita. La ŝafisto havas apartan bastonon por iri kun ĝi en la preĝejon aŭ en la oficejon, kie ĝi devas sciigi pri la profesio de sia portanto. La bele formitaj objektoj do havas simbolajn signifojn.

Semantiko de la objektoj

Menciiĝis jam, ke la belaj objektoj sorto mia, / ĉar mi vidas, ke jam ĉio bona estas por tiu alia." El tiu branĉo ni rigardu ankoraŭ argilbotelon: „Kara mia botelo, / mia sola espero, / se la koro doloras, / ĉiam vi min konsolas."

La mesaĝo havas plurajn tavolojn. Ni menciu nur supraĵe, krom la ĝisnunajn, unu gravan trajton: la multeco kaj la kvalito de la ornamitaj objektoj esprimas la socian lokon, staton de la posedanto, ili kvazaŭ plifortigas unu el la bazaj homaj necesoj – la konscion pri la loko okupita de la individuo.

Preparo kaj akiro

Tiuj mesaĝenhavaj objektoj, kiuj „stenografie" orientas inter la eventoj de la vivo, pligraviĝas dum la jarcentoj paralele al la delikata tavoliĝo de la vilaĝa socio. Ĉiam pli grandaj fortoj dediĉiĝis al ilia preparo. Laŭ dokumentoj, en la grenrikoltaj paŭzoj, kiam la falĉistoj ripozis, la falĉaĵkolektaj knabinoj brodis, preparis siajn tukojn kaj kusenujojn por la dotaĵo. Kaj iuj, sufiĉe riĉaj dotaĵoj havis eĉ 300-400 metrojn da ornamitaj tolaĵoj! Ankaŭ la proverbo pruvas: Kiom da filinoj li havas, tiomfoje forbrulis lia domo. Ni povas do imagi al ni, kiel granda financa ofero estis unusola nuptofesto. Se por la tolaĵoj iu kulturis linon, nepre li devis krome aĉeti, ĉar la propra ne sufiĉis. Le Play, franca sociologo en 1846 dokumentis, ke en Hungario en iu servutula familio la edzino 113 tagojn dum la jaro okupiĝis pri lino, tamen ŝi povis produkti nur kvaronon de la necesa kvanto, la cetera devis esti aĉetita, kiu forportis 38 procentojn de ĉiuj monenspezoj.

Iu parto de la objektoj – ĉefe la brodaĵoj, tolaĵoj – prepariĝis hejme aŭ en la ŝpinejo, kie kunvenis la gejunuloj kaj kune laboris, kune distriĝis. La spertuloj en la vilaĝo libertempe volonte transdonis sian scion al la interesiĝantoj, sed ankaŭ ilia laborpovo ne sufiĉis por kontentigi la enormajn postulojn. Elstaran lokon havis la gildoj.

Epokoj de la popolartoj

En senĉese renoviĝanta procezo viciĝas antaŭ ni la objektoj. Ni trovas epokojn



Brodaĵo sur ornampelto

de diferenciĝo, multiĝo de la artaĵoj, poste eraojn de paliĝo, malatento. Jen malrapide, jen rapide ŝanĝiĝas, transformiĝas la opaj branĉoj, la ornamaĵoj, la formoj kaj motivoj. Ni spertas milvoĉan orkestron, tamen eblas distingi estis uzataj nur esceptokaze, nur kiam ili plenumis siajn rolojn en la festaj agoj, nur kiam estis publiko por percepti la mesaĝon. Tiuj okazoj estis la turnopunktoj de la vivo: elekto de fianĉino, nuptofesto, naskiĝo, morto. Kaj la signifoj – kvankam senteblas ankaŭ transcendaj influoj – estas troparte ĉi-mondaj, homaj.

Ni rigardu ekzemple la paradan liton! Oni neniam dormas en tiu ĉi lito, kvankam ĝi estas eble la plej valora peco en la kamparana domo. Ĝi aperas unue en la nuptofesto kvazaŭ ekspoziciita en la domo de la fianĉino. Post ŝerca (kelkfoje eĉ obscena) marĉandado ĝi estas transdonita kaj portata tra la tuta vilaĝo (la signifo ne estas miskomprenebla, ĝi aludas pri la para kunesto de la novaj geedzoj) al la nova hejmo, kie ĝi okupas la plej elstaran lokon. La lito kun siaj puntornamitaj, broditaj, grandvaloraj kusenoj kaj tukoj ĉiam pli strikte apartenas al la edzino (se ŝi mortas, la gepatroj rericevas ĝin).

La parada lito kiel objekta dokumento de la geedziĝo staras en la ĉefa loko, kaj simile al la homoj, ĝi ŝanĝas siajn vestojn. La tukoj kaj la kusenujoj varias depende, ĉu estas labora aŭ festa tago, ĉu estas somero aŭ vintro, ĉu iu naskiĝis aŭ mortis. El la litopartoj estas konstruita la katafalko; la flankon kaj la antaŭan parton ornamas bele teksitaj, broditaj kovriloj, tukoj. Pliaj tukoj kovras mem la mortinton. Ankaŭ post la entombigo la kusenoj surhavas la sepultajn kolorojn.

Mesaĝojn peras ne nur objektoj, ilin kompletigas aliaj elementoj de la rito: kantoj, gestoj, diversaj tekstoj ktp. Tiu elstara loko nepre devenas el erao sen skribo, kiam ili enkorpigis la grandajn eventojn, la sortdecidan kontrakton: la geedziĝon, la vortojn de la nuptoestroj, la tutan familian historion, la kunligitecon de naskiĝo kaj morto, la manpremon de prauloj kaj posteuloj. Tion certigas la simbolaj ornamaĵoj, kiuj tamen pluvivas eĉ post la konatiĝo kun la skribo. La fenomenoj de la popolartoj plene substrekas tiun aserton de informadiko, ke la informaĵo des pli certe alvenas al la adresito, ju pli multajn kanalojn ĝi uzas.

La ĵus diritaj koncernas preskaŭ ĉiujn artaĵojn: dotaĵkestojn, spegulojn

Homforma vinkruĉo „Miĉjo"

aŭ manajn kalandrilojn. Sur iu tolfiksilo ĉizis enamiĝinta junulo: „Estas forrabita, kiu povus esti ĝojo nur por la pli fortajn voĉojn. En la 18-a jarcento, tuj post la forpelo de la turkaj okupintoj, kiam la materialaj diferencoj ne estis tro grandaj inter la nobeluloj kaj la kamparanoj, ni vidas noble simplajn formojn ĉe la ĉiutagaj ujoj kaj ceteraj objektoj, sur ili aperas geometriaj figuroj, sed la ĉeftemo estas (same kiel en la florkantoj tiuepokaj) la florornamoj, tulipoj, granatoj, diantoj, florbranĉo- kaj florkron-kompozicioj. Inter la floroj troviĝas cervoj, birdoj, pavoj, pelikanoj. En tiu epoko elstaras la preĝejoj kun siaj pentritaj lignoplafonoj, benkoj, katedroj, altarkovriloj, kiuj montras la artisman idealon de la kamparanoj, ĉar ja la temploj servis kvazaŭ „bela ĉambro" por la tuta vilaĝo. Ĉi tie ni ne trovas diferencon inter la „sinjora" kaj la „kamparana" artoj, eble nur la teknika kvalito varias. Por ambaŭ tavoloj laboris la samaj gildoj, do la simileco estas tute komprenebla.

Sed poste la nobeluloj riĉiĝis, la pli fruaj argilaj kruĉoj, teleroj, pladoj ŝanĝiĝis je arĝentaj. La unuaj pecoj devenis el eksterlando, sed poste jam la hungaraj gildoj preparis ilin laŭ la nova, eksterlanda, ĉefe germana gusto. Tio rezultigis la disiĝon de la gildoj, tavoliĝis iu parto „florskribanta", kiu laboris nur por la kamparanoj, la ceteraj metiistoj nur por la burĝaro kaj la nobeluloj. Tiuj lastaj servis poste kiel bazo por la elformiĝo de la fabrikoj, dum la tradiciaj eĉ mem fariĝis vilaĝanoj, kaj ili estis la certigantoj de la granda prospero de la popolartoj en la pasinta jarcento.

La servutuloj ekhavis iujn rajtojn, kaj ilian aĉetpovon fortigis la agrara konjunkturo en Eŭropo. La tradiciaj gildoj ricevis la mendojn amase. Krom la tradiciaj branĉoj elformiĝis eĉ novaj, el kiuj la plej grava estas la parada pelto. Tiu ĉi vestaĵo strikte apartenis al la subaj popoltavoloj, kaj ankaŭ ornamoj radike diferencas disde la pli fruaj, sinjoraj, do ankaŭ tio esprimas la konsciiĝon de la popolo: la liberbatalo en 1848-49 neforviŝeble gravuris en la cerbon de la kamparanoj la

Vilaĝmuzeo en urbo Szombathely

koncepton de nacia ŝtato kun samrangaj civitanoj. La normoj de la antaŭaj jarcentoj ŝanĝiĝis, kaj ĝuste tiu tavolo, kiu alportis la kulminon, fosis la tombon de tiu mezepoka multfaceta mondo.

La konjunkturo falis, la procezo de industriizado daŭris, el la kamparanaro elformiĝis nova klaso, la laboristaro. La nova vivoformo ne plu favoris la popolartojn. Ankaŭ la vilaĝoj unu post la alia ŝanĝiĝis ĉirkaŭ la jarcentturniĝo. Tiu procezo kelkloke daŭris longe, kelkloke okazis de unu tago al la alia. La novan vivoformon helpis ŝanĝi ankaŭ la deviga soldatservo de la kamparanoj. La unua mondmilito kaj poste la intermilita erao subsinkigis tiun malnovan objekto-mondon kun sia specifa, multfaceta signifo. Ĉi tie ni substrekas nur, ke la intermilita reĝimo eĉ klopodis falsigi la popolajn artojn, anstataŭigi ilin per romantisma, ŝovinisma koncepto.

Boatoformaj popolaj tombkolonoj (Fotoj de Zoltán Fejér)

Hodiaŭ, morgaŭ

La popolartaj strebadoj – post la strebado de kelkaj eminentuloj inter la du mondmilitoj – intense komenciĝis nur post la liberiĝo (1945). Amaso da muzeoj, inter ili ankaŭ vilaĝmuzeoj, konservas la memorajojn de la forpasintaj tempoj, kaj amaso da metiistoj daŭrigas la noblajn tradiciojn. Tamen ne plu estas jam reportebla la iama kulmino de popolartoj, inter la nuna renesanco kaj la florperiodo estas profunda abismo.



Interno de kalviana preĝejo kun pentrita lignoplafono, konstruita ĉirkaŭ 1760

En mia ĉambro mi havas malnovan marmiton, eble 200-jaran. Ĝi estis uzita en la nuptofesto de miaj geavoj kaj prageavoj. Pluraj homoj volis jam aĉeti ĝin, sed ĝi ne estas por vendi, ĝi apartenas al mia persona vivo, heroldas pri malnovaj tempoj, atestas pri mia loko en la generacioj. Mia najbaro estas ceramikisto, li klopodas revivigi malnovajn motivojn, ornamajojn, sed li ĉiam plendas, ke homoj volas aĉeti nur ion interesan kaj „belan" (ĉi lasta ofte signifas „kiĉan"), nur ĉar tio „bone aspektas" en la ĉambro.

Eble tio estas la diferenco inter florperiodo kaj renesanco?

Kiel loĝos homoj en la estonteco?

Aronson en rondo de diskutantoj (Fotoj: István Sági)

Endre Barát, ĉefsekretario de HEA malfermas la aranĝon

La loĝantoj en Szentendre alkutimiĝis jam al tio, ke precipe somere centoj da turistoj svarmas sur la stratoj. Multaj interesaj muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj allogas la en- kaj eksterlandanojn en ĉi tiun pitoreskan urbeton.

Inter la 8-a kaj 22-a de aŭgusto multe da gejunuloj venis ĉi tien ne nur pro la beleco de la urbo, sed ĉar Szentendre fariĝis hejmo de la seminario de Interfaka Scienca Studentrondo (ITDK) kaj TEJO, sub la titolo „Homaj loĝlokoj hodiaŭ kaj morgaŭ". La temo interesas la junularon, pri tio atestas, ke 55 eksterlandaj kaj 15 hungaraj esperantistoj partoprenis la seminarion. Esperantistoj el Italio, FRG, Pollando, Sovetio, Jugoslavio, Grand-Britio, Nederlando, Francio, GDR, Portugalio, Brazilo, Hispanio kaj Libano pasigis unu semajnon kune. Krom ili alvenis ĉiutage gestudentoj el plej diversaj hungaraj universitatoj kaj altlernejoj.

La Interfaka Scienca Studentrondo ekzistas ekde la 25-a de aprilo 1981. La celo de la rondo estas, ke la studentoj laboru kune por la solvado de realaj, multflankan alfrontadon pretendantaj taskoj. Ĝia programo direktiĝas al la esplorado de la homa vivmaniero kaj celas projekti por tio komunan eksperimentan loĝkvartalon. Ĝiaj membroj kompilis proponon kun la titolo: „Propono por konstruo de komunuma loĝkvartalo, realigenda kiel socia eksperimento." Dumtempe TEJO informiĝis pri la agado de la rondo kaj decidis kunlabori kun ĝi. Sekve de tio TEJO proponis aranĝi sian sekvan seminarion kunlabore kun la Studentrondo en Szentendre. La kunlaboro pruviĝis utila por ambaŭ organizoj. La esperantistoj kontribuas al la planado de loĝkvartalo per eksterlandaj spertoj kaj samtempe ili ekkonas la sciencan kaj kulturan vivon de nia lando.

La seminario estis vere altnivela, prelegis famaj scienculoj, kiel Elliot Aronson, socialpsikologo en la Universitato en Kalifornio, la hungardevena György Kepes, artteoriisto en la Teknologia Instituto de Massachussets, Jiři Musil, sociologo en Instituto por Urboplanado en Prago, Hristo Marinov, prezidanto de la Bulgara Ekologia Societo, Horst Heinicke, arkitekto el Karlsruhe (FRG), Géza Kovács, prezidanto de Interfaka Scienca Studentrondo, ekonomikisto, Endre Czeiczel, genetikulo, Tamás Meggyesi, urbo-arkitekto en la Budapeŝta Teknika Universitato ktp. La prelegojn sekvis diskutoj etendiĝantaj ĝis noktomezo.

La esperantistoj ĝojus, se tiu aranĝo fariĝus tradicia. Ni esperas, ke sekve de la ĉijara sukceso, sekvontjare ankoraŭ pli multe da esperantistoj alvenos en Szentendre. Kaj ni esperas, ke ankaŭ la membroj de la Studentrondo emiĝos alproprigi la Internacian Lingvon kaj post kelkaj jaroj tiu seminario jam ne konos lingvajn malfacilaĵojn.

Ildikó *Dudás*

D-ro István Tölgyesi
(inspektoro pri botaniko ĉe KNP)

„Kiskunság" Nacia Parko



Inter la leĝe protektataj regionoj en Hungarlando apartan rangon meritas Kiskunság Nacia Parko (KNP) – fondita en 1975 – kiu gardas inter Danubo kaj Tiso la plej valorajn pejzaĝo-partojn de la t.n. Kiskunság. Tiu ĉi regiono de la Granda Ebenaĵo, ankoraŭ multe konservas el ĝia ŧlaŭro kaj faŭno de la orientaj stepoj, fakte, ĝi estas la plej okcidenta el tiuj stepoj. La Nacia Parko konsistas el 6 apartaj areoj, do ĝi estas kvazaŭ mozaika parko (vd. la mapon); ĝia direkcio funkcias en la proksima urbo Kecskemét.

Kiuj estas la ĉefaj taskoj de la Nacia Parko? Mallonge kaj koncize oni devas unue mencii la protektadon de la pejzaĝon karakterizantaj flaŭro, faŭno kaj ties vivnecesa ĉirkaŭaĵo. Tiun tre respondecan agadon oni povas plenumi nur pere de paralelaj sciencaj esploradoj, sekve ankaŭ pri tio zorgi apartenas al la gravaj taskoj. Aldone, sed ne lastvice, la direkcio organizas por la publiko diskonigon de la sciencaj rezultoj, klarigas kaj demonstras la tie troveblajn valorojn de la naturo.

Kompreneble ankaŭ la homo estas prezentinda, la homa agado tra la jarcentoj sur la Granda Ebenaĵo, ja ĝi estis la plej aktiva transforma faktoro dum la historio. Pro tio la Nacia Parko multe zorgas ankaŭ por flegi la tradiciajn vivmanierojn de la paŝtistoj, de la dise sur apartaj farmoj loĝantoj, kaj por gardi ĉiujn aĵojn kiujn ili uzas aŭ uzis en la mastrumado.

Por mallonge prezenti la Nacian Parkon ni rigardu ĝin laŭ la ĉefaj geografiaj karakterizoj. Unue ni mencias la *inundareon* (sur la mapo I.), kiu donas neforgeseblan impreson al la vizitanto. La eksa fluejo de Tiso (meandro), la apudaj arbaroj, marĉoj kaj freŝaj herbejoj formas ravan kaj pitoreskan bildon.

Okaze de grandaj inundoj la teritorio akceptas – kiel helpa rezervujo – freŝan, oksigenriĉan akvon de Tiso malgraŭ la pasintjarcenta riverreguligo. Dank' al tio, ĝiaj vegetaĵoj, kvankam similas, tamen ankaŭ diferencas de la stagnantaj marĉoj. La variecon de tiu teritorio pliigas la renkonto de la rivervalo de Tiso kun la pli altaj pejzaĝoj situantaj inter Danubo kaj Tiso. Eblas do vidi ankaŭ la karakterizajn flaŭron kaj faŭnon de la seka sablejo. Tra la protektata teritorio estis turistvojoj konstruitaj, kaj boatoj atendas la amantojn de la silenta naturo.

Tute alispeca ŝajnas la aspekto de la *sodaj stepoj*, kies tre bela disvolviĝo estas studebla sur la teritorioj II. kaj III. La salo akumuliĝas surface de

Flanka branĉo de Tiso ĉe Lakitelek (Foto: F-né Béres)

grundoj kun malbonaj aerumado kaj akvumado; ĝia grava ingredienco estas la sodo ($NaHCO_3$), kiu kreas malfavorajn cirkonstancojn por la vegetaĵo. Tiuloke vegeti kapablas nur la salon tolerantaj aŭ ŝatantaj specioj de kreskaĵoj kaj kelkaj, per tiuj vivantaj animaloj. Lignecaj kreskaĵoj tute mankas, esceptas nur plantitaj arbaroj sur la altaj lokoj. Nur paŝtante eblas utiligi tiun teritorion.

Dank' al la specifaj ekologiaj cirkonstancoj, tie ekzistas multaj indiĝenaj specioj. La plej profundajn lokojn plenigas sezonaj, sodaj lagetoj. Pro la tre bazeca (pH=9-12) akvo la lagoj estas aparte interesaj el ornitologia vidpunkto. La teritorio II. altiras multajn vizitantojn, precipe dum la spektakloj de la „Kiskunság" Tagoj de Paŝtistoj kaj Rajdistoj en *Apajpuszta*. Cetere la plej granda parto de la du teritorioj estas severe protektata.

Paŝtistoj en Bugac (Foto: F-né Béres)



Muzeo de la Nacia Parko Bugac

(Foto: D-ro István Tölgyesi)

Estas tie tre ampleksaj ankaŭ la *sen-elfluaj marĉoj*, kies plej bela ekzemplo estas ĉe *Izsák* la Lago Kolon (V.). En la norda, plej profunda parto de tiuj areoj – tro malsekaj pro riveraj kaj lagaj akvoj – nun regas densaj, marĉaj kanejoj. Al sudo pasante, laŭ la nivelaltiĝo ties rolon transprenas la arbustaj salikejoj, poste la marĉaj arbaretoj kaj bosketoj. Iom pli alte marĉaj herbejoj kaj fojnoproduktaj kampoj igas romantike ĉarma la pejzaĝon. Orkideoj kaj aliaj raraj, karakterizaj specioj ĉi tie abunde troveblas, jen la kaŭzo kial la teritorio apartenas al la severe protektataj.

Sablaj stepoj kaj arbaroj donas la veran karakteron de la Nacia Parko. La pli-malpli amasaj sablaĵoj kaj sablomontetoj troviĝas precipe en la teritorio IV. kaj VI. La ampleksa altaĵo inter Danubo kaj Tiso konsistas el ega sabloamaso, kiu devenas el la pratempaj Danub-fluejoj. Dum la postaj jarmiloj la regantaj ventoj – en direkto NW-SE – turnis la sablon al vicoj paralelaj, kie iam vegetadis arbara-stepa flaŭro. Sekve de senarbigadoj kaj paŝtado en la pasintaj tempoj, denove ekfluis la sablo, kelkloke ekregis la mol-tiga vegetalaro. Tio estas tre bone observebla ĉe *Fülöpháza* (IV.), kie ankoraŭ nun moviĝantaj sablomontetoj estas rimarkeblaj.

La denova arbariĝo kaj la strukturo de la iama arbara-stepa pejzaĝo karakterizas la teritorion de *Bugac* (VI.). La scienca valoro de la tieaj arbaroj de junipero kaj poplo estas fame konata. Sodaj lagoj, platmarĉoj kaj altmarĉoj okupas la intervalojn de la sablomontetoj, ne mirinde do, ke la „puszta" de Bugac delonge iĝis altfama vidindaĵo. Krom la naturaj belecoj oni admiras tie ĉi la senbridan galopegon de hungara miksrasa ĉevalaro, la trankvile paŝtiĝantajn grizajn bovojn kaj la ŝafaron de specifa hungara specio (elp. racka). En ambaŭ teritorioj troviĝas severe protektataj kaj libere viziteblaj partoj.

Akoro estas karakteriza marĉa floro

(Foto: D-ro István Tölgyesi)

La direkcio de la Nacia Parko krome direktas ankaŭ la Regionon Protektatan ĉe Orgovány (1.) kaj pluaj 7 natur-protektajn regionetojn (2--8.). En la oriehta parto de la protektata rajono la pejzaĝo estas same admirinda kiel ĉe Lago Kolon; la okcidenta parto plezurigas per panoramo de sablomontetoj. La naturprotektaj regionetoj prezentas iom el ĉiuj menciitaj pejzaĝaj tipoj.

La protektataj teritorioj tute diferencas de la montaraj pejzaĝoj, ili prezentas la belaĵojn kaj la ĉarmon de la Hungarlanda ebenaĵo. Tiuj naturvaloroj ricevis internacian rekonon en 1979, kiam du trionoj de la Nacia Parko fariĝis „biosfero-rezervejo". Plia devigo estiĝis do al la direkcio montri la Nacian Parkon al la publiko en la plej konvenaj manieroj. Ĉiuj informoj pri la libere viziteblaj kaj la severe protektataj teritorioj, pri la muzeoj kaj ekspozicioj de la Nacia Parko, estas volonte donataj al la interesiĝantoj. La adreso: Kiskunság Nacia Parko, Direkcio, H–6000 Kecskemét, Liszt Ferenc u. 19.

(Trad. E.F.)

De Kongreso al Kongreso

La 67-a Universala Kongreso havis apartan gravecon por la hungara esperantistaro: ĝi estis la lasta eblo spertiĝi en kongresaj laboroj antaŭ la 68-a UK, okazonta en Budapeŝto inter 1983-07-30/08-06. Kaj hungaraj esperantistoj ne preterlasis la eblon – pli ol 60 personoj el Hungario partoprenis la 67-an UK inter la suma partoprenantaro de 1899 homoj el 50 landoj.

La ĉefa temo de la kongreso estis: „Generaciaj aspektoj de la Esperantomovado", kiu temo vekis vastajn kaj interesajn diskutojn. Plej ofte lanĉiĝis la demando: kial la aĝ-konsisto de nia movado estas dupolusa – multaj junuloj kaj multaj maljunuloj, kaj apenaŭ homoj el la meza generacio?

En la impona inaŭgura solenaĵo kiel jam estas kvazaŭ tradicie, fest-



La kongresa libroservo ofertis plurajn centojn da titoloj

Post la sukcesa prezentado de „Profeto..." tostas la reĝisoro, László Romhányi

parolis ankaŭ nun eksterulo, ĉifoje Mustapha *Masmoudi,* estinta ambasadoro de Tunizio ĉe UNESKO. S-ro Masmoudi estas eksperto pri la problemoj de internacia komunikado, en kiu li trovas tre grava la lingvan aspekton. Li diris interalie: *„Mi ankoraŭ ne estas esperantisto, sed mi kredas je la taŭgeco de grandaj iniciatoj, similaj al la via. Mi esperas, ke Esperanto kaj ĉiuj personoj kiuj laboras por la sama celo, fine trovos favoran eĥon en la sino de la internaciaj organizaĵoj, alportante sian kontribuon al ordigo de la lingvaj problemoj, kiuj ofte troviĝas ĉe la origino de la manko de internacia kompreniĝo. Via Asocio meritas respekton kaj konsideron de la homaro."*

Salutis la kongreson pluraj diplomatoj, inter ili s-ino Irén *Pehr,* aferŝarĝito de la Hungara Ambasado en Bruselo.

La Komitato de UEA plurfoje kaj fruktodone kunsidis dum la kongreso. Ĝi faris plurajn gravajn decidojn, interalie ĝi difinis la temon de la 68-a UK. Laŭ tio en Budapeŝto la kongreso traktos pri *„Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado."* Jen du pliaj komitataj novaĵoj: ekde 1983 la revuo *Kontakto* aperos 6-foje dum jaro, kaj oni komencis la kompostajn laborojn de la nova *Esperanta Antologio.*

En la kongreso ĉeestis rimarkinde multaj akademianoj – entute 18. La Akademio faris ankaŭ grandsukcesan

La giĉeto de la 68-a UK vaste informis pri Hungario – nun deĵoras tie Sándor Jakab, estrarano de HEA



Akademianoj respondas la demandojn de la publiko

publikan kunvenon, en kiu la ĉeestantoj faris tre interesajn lingvajn demandojn, kiuj ofte vekis diskutojn eĉ inter la akademianoj mem.

Por la premioj de Belartaj Konkursoj alvenis entute 117 verkoj. La unua premio en la branĉo *Poezio* estis aljuĝita al Johan H. Rosbach (Norvegio), en *Prozo* kaj *Teatraĵo* al Bernard *Golden* (usonano, vivanta en Hungario). La Premion Minnaja (por la plej bona eseo) gajnis Oldřich *Knĭchal* (ĉeĥo, vivanta en Hungario). La fotisto de HV, Zoltán *Fejér* atingis trian premion en la foto-konkurso per la foto „La aktorinoj en *La aŭroroj ĉi tie estas silentaj*".

La 67-a UK havis riĉan kulturan programon. Krom altnivelaj nacia kaj muzika vesperoj okazis multnombraj teatraj prezentadoj. La franca trupo „La Krizalido" rolis kun *La Evento* de Foissy, kiu teatraĵo premieris ĉi-printempe en Budapeŝto, alia franca trupo „Tespa" ludis la dramon de Sartre *Sen eliro.* Prezentis tre interesan programon la kabaredo „Ruza Kruĉo" (same el Francio). Hinda pupista trupo regalis la publikon per Tagore-verko de poezia etoso, dum Drama Grupo de Studenta Esperanto-Grupo el Zagrebo ludante la gajan teatraĵon *Gastamo* de Spomenka *Štimec,* prezentis tute realan scenon el esperantista hejmo, kiun inundas diversnaciaj gastoj. Ankaŭ hungara trupo aperis en la 67-a UK: estis prezentita la printempe furorinta teatraĵo *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?* de János *Elem,* en kiu ĉifoje rolis ankaŭ du amatoroj (pro malhelpiteco de du aktoroj): Péter *Rados* kaj József *Horváth.* (Verdire tre malmultaj spektantoj rimarkis, ke ili ne estas profesiuloj.) La teatraĵo estis prezentita dufoje en la Antverpena „Teatro Arenberg" antaŭ plena spektejo.

La sukceso plezurigis la ĉeestintajn hungarajn esperantistojn, tamen, la plej emocia momento por ili okazis dum la *Solena Fermo,* kiam d-ro Endre *Barát,* prezidanto de la LKK de la 68-a UK transprenis la kongresan flagon kaj invitis ĉiujn kongresanojn al Budapeŝto.

La tondra aplaŭdo, kiu kvitancis liajn vortojn, konjektigis, ke multaj senhezite akceptis la inviton...

V. *Benczik*

La urbestrino de Antverpeno (meze) salutas la reprezentantojn de la kongreso

William Auld, la prezidanto de la Akademio inter la hungaraj aktorinoj Ildikó Pécsi kaj Zsuzsa Szilágyi. Dekstre staras Flóra Szabo-Felső, ĝen. sekretario de UEA

ORIGINALA POEZIO

Johan H. Rosbach

La portalo de Urnes

Altaj montoj turas,
pezaj, nigrebrovaj,
post la sunsubiro.
Ĉe la strand' senmovaj
fokoj naĝas mute.
Je brumeca lumo
sidas maljunulo
en olea fumo
el plektita meĉo.
Grizas liaj haroj.
Sed li majstras brile
dum fervoraj faroj
memfaritajn ilojn.
Leda antaŭtuko
kovras la genuojn.
Kun klinita nuko
tranĉas li karese,
ĉizas noblan lignon,
tuŝas sian bildon,
sentas ĝian dignon.
Liaj feroj tajlas
flate la konturojn
de la monstra drako,
kaj la fajnajn spurojn
de la akraj iloj
palpas delikate
kalaj fingropintoj,
dorloteme, glate.

La leono reĝa,
kiun ligno kaŝis,
vivе kaj majeste
reliefe paŝis
jam el lia breto,
bildo pri la Bono,
kaptas ĉe la kolo
drakon sen mentono.
Sed la skvama besto
en serpenta tordo
toksas noblan sangon
por venena mordo.
La eterna lukto,
Bono kaj Barbaro,
Dio kaj Diablo,
pretas por altaro.
Kaj la olda viro
metas la ilaron
en la etan keston.
Finis li la faron.
Sed la lampa meĉo
nigre ekfumaĉas.
Super nigra akvo
vintra ŝtorm' ekkraĉas,
furiozas fukoj,
dum la maro tajdas,
super mornaj montoj
blanka luno rajdas.

Belartaj Konkursoj 1982
Originala poezio: unua premio

Edwin de Kock

Gilgameŝ

Kiom jam estis:
Vizaĝoj rebatitaj
en la argilon?
Demandu Utnapiŝtim,
la gloran filon
de Ubar-Tutu, solan
post diluvepok'
restintan kun la steloj,
dum terorado
ĉirkaŭglite remodlas
la tagotrajtojn.
Potpece foreriĝas
patro post patro
– ĉu soliduloj, foje,
ĉe l' flustra Eŭfrat'?
Kaj reas homoj, veloj
apud brikamas'
da renversitaj revoj.
Pretere maro,
plorsala akaparo.
Ciklopa luno
sinkas rufe trans ondon
en cerbosulkojn.
Silentas Utnapiŝtim.
Pri la perdiĝo,
pri perdo de la karaj,
spiru respondon
nur kiuj mem forpolvas
el vant' al vano,
aŭ la brizo pasema
kaj akvo kontraŭ kano.

Julio Varga

Virino

Pri ŝi neniu verkis odon,
ankoraŭ ne ricevis ŝi ordenon,
funebrajn kantojn, kaj ne gajajn kantis,
por ŝi la vito nur acide fruktis,
travivis du militojn, grandajn, sangajn,
la tagoj estis plie nubaj ol serenaj.

Heroo nomas oni la „bravulon",
kiu ekstermas pli ol milionoj –
kaj ŝi? funebris pro la edzo, kiu
en la milito verŝis sangon sian.
Neniam por ŝi la labor' finiĝis,
kvankam ŝi unuigis tagon, nokton,
por aliuloj lavis la tolaĵon,
por ja vivteni tri malgrandajn filojn;
soleca arb'! ĉagren', insult' ŝin plagis,
toleris ŝi, kaj venĝis al neniu. –

Do kiu estas la hero' pli granda:
la forprenanto, aŭ la sindonanto,
la detruanto, aŭ la konstruanto,
kaŭzanto aŭ viŝanto de la larmoj,
la egoisto, dorlotanto de „MI",
aŭ, kiu distribuis sian koron? ?...

Ne estas ŝi nobel', nur „senpraula",
sed nobla 'stas. Hero' de labortagoj!

Imre Szabó

Sonoriloj

Sonoriloj jubilaj
sepultaj
Sonoriloj de aŭroroj
sunofaloj
Sonoriloj senlimaj
Sonoriloj brakumaj
Sonoriloj karno de festoj
Sonoriloj venas sur la avenuoj
Sonoriloj sur la padoj
Sonoriloj flamas super la tegmentoj
Sonoriloj ardas sub la teroj
Sonoriloj en la vejnoj
Sonoriloj koroj de turaro
koroj tintaj
sinbatantaj

Pri la hungara agrikulturo

La 20-an jarcenton karakterizas antaŭ ĉio grandega industria evoluo. La industria produktado kreskis plurdekoble, kaj la industrio ludas decidan rolon en la ekonomio de ĉiuj evoluintaj landoj.

La agrikulturo perdis sian pli fruan rolon, ĝia proporcio en la naciaj ekonomioj ŝrumpis. Tamen, la agrikulturo konservis unu specifan trajton: ĝiaj produktaĵoj estas ne-malhaveblaj kaj ne-anstataŭigeblaj, ja ili servas por kontentigi bazan homan bezonon.

Pro tio agrikulturaj produktaĵoj fariĝis kvazaŭ „strategiaj varoj". Ilia manko en plej diversaj regionoj de la mondo kaŭzas daŭre sociajn streĉitecojn. Precipe gravas la sufiĉa haveblo de du ĉefaj produktaĵoj: greno kaj viando.

La grenproduktado de la mondo estas ĉ. 1500 milionoj da tunoj (inkluzive rizon), kaj el tiuj 200 milionoj da tunoj aperas en la internacia merkato. Entute nur malpli ol 10 landoj eksportas, kaj ĉ. 130 landoj importas grenon en la mondo!

Hungario troviĝas inter la eksportantoj, kvankam kun kvanto ne signifa en tutmonda kadro. Tio ŝuldiĝas al la eksterordinare dinamisma evoluo de la agrikultura produktado dum la lastaj du jardekoj en nia lando. La jara kresko estis meze 3 procentoj, kio signifas ke la produktado dum du jardekoj preskaŭ *duobliĝis*. Oni aldonu al tio, ke samtempe la nombro de la agrikulturaj laboruloj *duoniĝis*, t.e. la produktiveco de la laboro *kvarobliĝis*.

Al tiu evoluo kontribuis multaj faktoroj teknologiaj, organizaj kaj sociaj. La teknologia evoluo ebliĝis per tio, ke la agrikulturo povis disponi la necesajn financojn. El socia vidpunkto tre favore influis la fakto, ke la plimulton de la agroj posedas kooperativoj, kies gvidantoj en ĉiu momento devas respondeci pri sia laboro antaŭ la membroj de la kooperativoj. (Tion ne bezonas fari fabrik-direktoroj, kiujn oni nomas desupre, kaj tiamaniere ili sidas pli „sekure" en siaj foteloj.) Eble la plej grava faktoro de la hungara agrikultura evoluo estis la ideala produkta strukturo, en kiu harmonie kuniĝas la diligento, iniciatemo de la individuo kaj la specifaj ebloj de la grandaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj. Tio funkcias ekz. en la bredado de porkoj kaj bovoj jene: en moderne ekipitaj staloj de grandaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj naskiĝas porkidoj kaj bovidoj de selektita speco, ilin aĉetas privatuloj – ordinare membroj de la koncerna kooperativo – kaj prizorgas ilin. Siaflanke la kooperativo certigas por tio la necesan furaĝon je favora prezo, kaj kiam alvenas la tempo, ĝi reaĉetas la buĉpretajn brutojn. Ĉirkaŭ du trionoj de porkoj kaj duono de bovoj' en Hungario estas produktaĵo de privatuloj, kaj por tiu ega kvanto de viando nek la ŝtato, nek la kooperativoj bezonis fari signifajn investojn.

Tiamaniere en la nuna momento la plej racie organizita produktobranĉo en Hungario estas verŝajne la agrikulturo. Staru ĉi tie internacia kompara tabelo pri la du ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj:

Produktado por persono (en kilogramoj)

	Greno kaj legumenoj		Viando	
	1975	1981	1975	1981
Bulgario	893	966	67	66
Ĉeĥoslovakio	637	627	88	93
Finnlando	690	495	54	i. m.
Francio	679	828	92	103
Nederlando	83	86	110	143
Kanado	1636	2070	94	100
Hungario	1173	1211	121	132
GDR	533	534	102	110
FRG	358	377	68	79
Sovetio	551	i.m.	59	58
Usono	1171	1438	109	108

i.m.: indiko mankas

V. *Benczik*

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

5. Naskiĝo de du tendencoj

La unua internacia kongreso de la esperantistoj en *Bulonjo sur-Maro* (1905 08 05/13) estis vera sensacio en la mondo, Esperanto-movado nur post tiu okazintaĵo fariĝis vaste konata. La esperantistojn entuziasmigis la triumfo de la buŝa lingvo, same, kiel patrinon la ekploro de novnaskito. Sed ilian atenton baldaŭ altiris aliaj eventoj.

Jus antaŭ la kongreso aperis la verko *Fundamento de Esperanto*: lingvohistoria dokumento, kiu fiksis la strukturon kaj la ĝeneralajn konturojn de la Internacia Lingvo, kaj donis la bazon de la ĉiutage uzata, t.n. komuna lingvo. Tiu verko enhavis la ĉefajn trajtojn de la dum 18 jaroj naskiĝinta lingvo, sed tute ne estis *la* lingvo – kiel multaj pensas –, nur ĝia kerno, ĝia fundamento.

La Bulonja Kongreso rezolucie agnoskis la lingvan tradicion dokumentitan en la Fundamento de Esperanto. Tiuj tradicioj de la Internacia Lingvo kompreneble estis nek pli nek malpli devigaj, ol la tradicioj de iu ajn nacia lingvo. Ĉi tiu aserto koncernas ankaŭ la multe diskutitajn leksikologiajn tradiciojn: „Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi;* la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado,* ne per nuligado kaj sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura,* senkonfuza kaj sendanĝera."

La Bulonja Kongreso agnoskis ne nur la lingvajn, sed ankaŭ la movadajn tradiciojn, el kies klarigoj konsistas la *Deklaracio pri Esperantismo* akceptita 1905 08 09. Tiu Deklaracio iĝis *stabiliga faktoro* en la interna firmigo de la Internacia Lingvo, kaj donis solidan bazon por *plua koherigado de la internacilingva movado.*



Eldona aktivado viglis

En la postaj jaroj leviĝis ĝishodiaŭa ĉeno de diskutoj pri tiuj du dokumentoj, pri ilia ĝusta apliko. Tial eble ne estas superflue emfazi la simplan fakton, ke la *Fundamento de Esperanto* kaj la *Deklaracio pri Esperantismo* konstatis, klarigis kompreneble *nur la ĝistiamajn lingvajn kaj movadajn tradiciojn,* kaj tute ne la ĝishodiaŭajn. Ili estas gravegaj lingvohistoria kaj historiaj dokumentoj, sed ne pli.

La kongresa periodo 1905-1914

Post la Bulonja Kongreso de jaro al jaro oni aranĝis la *universalajn kongresojn,* kiuj estis la ĉefaj renkontiĝeblecoj de la plej aktivaj esperantistoj, gvidantoj de la multnombriĝantaj lokaj kaj landaj asocioj. Kvankam okazis gravaj laborkunsidoj dum tiuj kongresoj, por la pli granda parto de la partoprenantoj la celo de la aranĝaĵo restis la interkompreniĝado mem. La kongresoj en tiu antaŭmilita periodo krom la laboraj kunsidoj havis unuavice efikan *manifestacian karakteron kun fortiĝantaj kultaj trajtoj.* Neniu el ili atingis la gravecon de la Bulonja, sed ili kvazaŭ karakterizis tiun „kongresan periodon."

Al la deka kongreso planita en *Parizo* 1914 08 02/10, aliĝis 3739 esperantistoj, sed pro la militdeklaroj kaj mobilizadoj nur 900 atingis la kongresejon, kaj okazis nur unu sola kunsido la 2-an de aŭgusto.

Gravaj estis la organizaj, instituciaj atingoj de la „kongresa periodo". Unu el ili estis la *Lingva Komitato* por konsiliĝi kun Zamenhof kaj tiel gardi la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontroladi la lingvoevoluon. La unua kongreso elektis ĝin provizora, kaj la dua kongreso en Ĝenevo deklaris ĝin definitiva. Sed ĉar la nombro de ĝiaj membroj estis super 100, tro alta, en 1908 en Dresdeno ĝi formis el si pli rapide kaj pli efike laborantan *Akademion,* konsistantan el maksimume 18 membroj, kun la sama estraro kiel la Lingva Komitato. Tiuj du lingvaj institucioj ekzistis ĝis 1948.

Elstaran dokumentadan kaj informan funkcion havis la de *Hypolite Sébert* estrata kaj private financata *Esperantista Centra Oficejo* en Parizo, fondita tuj post la Bulonja Kongreso, malfondita en 1922.

En 1906 leviĝis bezono kaj pli kaj

pli konkreta plano por organizi regulajn kontaktojn inter la plej bonaj, parolkapablaj kaj servopretaj esperantistoj. Tiucele Alphonse Carles iniciatis elekton de Esperanto-konsuloj kaj Theodor Rousseau starigon de Esperanto-oficejoj. La juna sviso *Hector Hodler* (1887–1920) speciale interesiĝis pri tiuj iniciatoj. Entreprenante la neprofitan eldonon de la *Revuo Esperanto* de 1907, li donis la plej fortan apogon al la realigo de la konsula reto, kiu jam fine de *1906 ampleksis 120 urbojn.*

Hodler klopodis kunordigi ilian laboron precipe per sia revuo, sed ankaŭ per aperigo de speciala libreto. Fine, *1908 04 28* li fondis la organizaĵon *Universala Esperanto-Asocio kun sidejo en Ĝenevo.* UEA de tiam regule eldonis jarlibrojn kaj la *Revuo Esperanto* fariĝis ĝia oficiala organo.

La celon de UEA oni fiksis jene: *„la plifaciligo de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj, kaj kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj."* Ĝi konsistis el individua membraro, el kiuj multaj akceptis la oficon *delegito* (nova termino por la estinta konsulo), t.e. volontulo, kiu libervole plenumas diversajn praktikajn servojn por la membroj, kiuj sin turnas al ili. Dekomence fundamenta principo estis la *neŭtraleco de la Asocio* rilate al religio, politiko kaj nacieco.

Ke UEA kontentigis jam fortan bezonon de la esperantistaro, tion tuj pruvis la multaj aliĝoj kaj la granda aktiveco. La membraro jam post tri monatoj atingis la nombron 1200, kaj post kelkaj jaroj superis 7000. La delegitara reto, kiu ampleksis ĉ. 1000 lokojn, en la jaroj 1909-1913 plenumis 45 mil praktikajn servojn. Do, *la movadanoj tute ne intencis atendi pluan disvastiĝon de la Internacia Lingvo, des pli tuj profiti ĝian aplikadon por la plej diversaj celoj.* Komence nur adeptoj de diversaj flankokupoj – precipe kolektantoj – profitis la okazon, sed konekse kun la vastiĝanta lingvoapliko organizata de UEA, oni ekuzis la lingvon en la plej diversaj sferoj de la homa agado. Komparante tiun lingvoaplikon kun la uzado de naciaj lingvoj, ni certe trovas ĝin malgranda, tamen signifoplena por la plua evoluo.

Utopiaj klopodoj kaj sekteco

La disvastiĝon de la Internacia Lingvo oni atendis de ekstermovadaj faktoroj, kaj precipe „de supre": de la socio, de sciencaj korporacioj, de registaroj, de instancoj, de internacia konvencio ktp. Tiu *desuprismo* ofte atingis la gradon de ia Mesio-atendo. Komence Zamenhof mem estis la ĉefa reprezentanto de tiuj iluzioj.

Jam en la Unua Libro Zamenhof iniciatis *tutmondan kolekton da promesoj* lerni la lingvon, kondiĉe ke estos kolektitaj dek milionoj da tiaj promesoj. En la Dua Libro li devis konfesi, ke tiu celo ŝajnas al multaj neatingebla. Tamen li persistis, ke „tiel je unu bela tago ni sciiĝos, ke la lingvo internacia fariĝis tutmonda."



Hector Hodler (1887–1920)

Sed tiu bela tago ne alvenis, kaj aperis alia iluzio: *transdoni la aferon al scienca korporacio,* kiu solvos ĉiujn prilingvajn kaj disvastigajn problemojn. Komisiono de la renoma *Amerika Filozofia Societo* (American Philosophical Society, Philadelphia) invitis aliajn sciencajn asociojn kaj institucioj n de la mondo por definitive solvi la mondan lingvan problemon. Zamenhof tuj decidis en 1888, „ke la sorto de l' lingvo internacia de nun transiras en la manojn de l' kongreso, kaj la fina formo, kiun la kongreso donos al la lingvo, devas esti leĝdonanta... *se la kongreso eĉ trovus necesa ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonebleco."* – Tiu kongreso ne efektiviĝis pro la indiferenteco de la invititoj.

Simila espero pri „aŭtoritata solvo" leviĝis en 1900. Zamenhof verkis la ampleksan studon „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia" por prezenti ĝin al la kongreso de *Franca Societo por Progresigo de Sciencoj* (Association Française pour l' Avancement des Sciences). Li konkludis, ke „la registaroj de ĉiuj landoj *devos* cedi, aranĝi internacian kongreson kaj elekti ian unu lingvon kiel internacian."

Solvis la problemon nek la franca societo, nek la registaroj, kaj venis la plej granda fiasko en 1907. Zamenhof post la fiasko jene resumis la aferon de la *Delegacio por Alpreno de Lingvo Internacia:*

„En la jaro 1900, kiam la esenco de la internacilingva afero estis ankoraŭ tro malmulte konata kaj la mondo pensis, ke ekzistas diversaj lingvoj internaciaj, kiuj inter si batalas, sinjoroj Couturat kaj Leau en Parizo fondis „Delegacion", kies celo estis: peti la Internacian Ligon de Akademioj, ke ĝi esploru, kiu el la ekzistantaj artefaritaj lingvoj taŭgas plej bone al la rolo de lingvo internacia, aŭ elekti mem komitaton, kiu esplorus tiun ĉi demandon. Kvankam de la jaro 1900 ĝis nun, la vivo *mem* jam solvis la diritan demandon, tamen por plenumi sian promeson, la Delegacio, en Oktobro 1907, kunvokis komitaton, kiu devis elekti lingvon internacian."

Tiu *Komitato* tute malatentis la ekziston de la Internacia Lingvo, t.e. *tute neglektis la praktikon, kaj alfrontis la problemon spekulacie,* pseŭdoobjektive: ĝi 1907 10 24 deklaris, ke la plej oportuna estas la *lingvoplano „Ido"*, fakte reformita Esperanto.

La sinsekvaj fiaskoj tamen ne sobrigis la plimulton de la esperantistaro, nur *pelis ilin al alia ekstremo.* Fortiĝis tendenco de *sekteco, enfermiĝo, kompleta kaj danĝera neglekto de diversaj sociaj fortoj, sciencaj rondoj, „eksteruloj".* La fortiĝon de tiu sekteca tendenco montris la rapida disvastiĝo de la kultaj fenomenoj, ekz. la „propra himno" kaj la „propra flago", simboloj, kiuj por „ĝisostaj verduloj" estas pli karaj ol eĉ la celoj mem.

Sed apero de la sekteco tute ne signifas, ke malaperis la „desuprismo". *La movado de ĉ. 1907 ŝarĝoportas ambaŭ ekstremajn tendencojn: la desupristan kaj la verdulan.* Tamen temas nur pri tendencoj, kaj ne pri personoj ! Ja la personoj ne malofte ŝanĝis siajn ekscesojn. Krome kaj fine: ne tiuj ekscesaj tendencoj estis la solaj en la movado, kompreneble; ĝi disvolviĝis, diferenciĝis pli kaj pli, fariĝis heterogena, bunta socia movado.

Renato Corsetti – Maŭro La Torre

Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado

O. Enkonduko

O.1 Ni celas per ĉi-tiu kontribuaĵo sisteme pritrakti la idearojn, kiuj far esperantistoj estas kunligataj kun Esperanto kaj kun la Esperanto-movado. Krome ni celas klare distingi inter ideoj rilatantaj disvastigon de Esperanto (por-esperantaj politikoj) kaj ideoj rilatantaj utiligon de Esperanto (per-esperantaj politikoj). Fine ni aparte insistas pri eblaj kunligoj inter la movado por internacia planlingvo kaj ĝeneralaj politikaj ideologioj.

O.2 Necesas tuj klarigi nian vidpunkton pri eblaj kunligoj inter ideologioj kaj lingvoj mem, do, iusence, pri naturo de lingvoj. Ĉirilate ni konsentas kun Detlev Blanke, kiam li asertas ke: „La koncepto, ke iu lingvo povas enhavi iun specifan idearon sole apartenantan al tiu konkreta lingvo, estas malĝusta." (1)

Tio validas por ĉiuj tiel nomataj naturaj-historiaj lingvoj, kaj marksismaj lingvistoj jam plurfoje klare kritikis la ideismajn konceptojn de lingvistoj, kiuj ekiras de malaj tezoj. Ni citu nur tre klaran kritikon de albana lingvisto A. Kostalari:

„En la granda malsameco de burĝaj lingvistikaj teorioj de nia jarcento... oni povas elekti du ĉefajn grupojn, kiuj situas je la du ekstremoj de nur unu sama ideisma linio. Je unu flanko troviĝas teorioj, kiuj kuŝas sur la hipotezo de Sapir-Whorf (Sepir-Ŭorf), kiuj akceptas la kunligojn inter lingvo kaj socio... sed atribuas al la lingvo... la estran lokon en ĉi-tiuj kunligoj... Ili simple inversigas la rilaton inter socio kaj lingvo. Ĉi tiuj teorioj... igas ĉiun popolon daŭra sklavo de ĝia propra lingvo...

La alia ekstremo formatas de ankoraŭ pli granda grupo de lingvistoj... (ĝi) ekstermas de la areo de lingvistika analizo la soci-ekonomiajn faktorojn, nomatajn eksterlingvaj. Ĝi klopodas eltiri la regulojn de lingvoj, kaj ekirante de biologiaj ecoj de homoj surbaze de „sinteno-psikologio", kiel faras Bloomfield (Blumfild) kaj liaj disĉiploj, kaj ekirante de la lingvo uzata de unu izolita individuo, kiel faras la strukturisma skolo de Londono...

La vivo de lingvoj kaj alia studado konfirmis, dum pli ol unu jarcento, ke la metodologio kiu permesas kompreni, taksi kaj solvi ĉi tiujn problemojn en taŭga maniero estas dialektika kaj historia materiismo, kiu vidas lingvon fenomeno socia ekde ĝia naskiĝo ĝis kiam ĝi realigas naciajn kaj internaciajn funkciojn, komplika semantika sistemo apart-tipa, kiu utilas kiel la plej grava rimedo por rilatoj inter individuoj de la homa socio." (2)

Do, ankaŭ Esperanto, ĉar ĝi estas lingvo nuntempe funkcianta kiel la ceteraj lingvoj, ne povas enhavi en si mem ion idean. Ideoj estas en la kapoj de la homoj, kiuj parolas Esperanton, en la esperantlingva socio, ne en la gramatikaj strukturoj de la internacia lingvo. Tre klare ankaŭ M. Isajev tion diras: „Per si mem ĝi (Esperanto) portas nenian idean ŝarĝon (laŭ socia signifo de la vorto). Oni povas uzi ĝin tiel por bono, kiel por malbono." (3)

Kompreneble, la rilatoj inter parolantoj de iu lingvo kaj parolata lingvo estas tiaj ke la lingvo respegulas la ideojn de la parolantoj (se iu homgrupo distingas nur du kolorojn, ilia lingvo havos nur du vortojn por la kolor-gramo) kaj, siavice, ĝi povas peri tiujn ideojn al aliaj homoj, aŭ dialektike efiki por plifirmigi tiujn ideojn. Ĉiukaze, en la rilato homa socio – lingvo, sendube homa socio, estas la estra faktoro kaj lingvo adaptiĝas je la bezonoj de la homo.

Do, ĉio, kion ni diros poste, rigardendas ĉefe kiel ideoj, kiujn esperantistoj kunligas kun Esperanto aŭ kun la Esperanto-movado, ne kiel ideoj kiuj enestas en Esperanto mem pro ĝia strukturo, gramatiko ktp.

Elekto de iu lingvo aŭ de alia por uzo en iu situacio estas alia afero kaj ĝi ja havas ideologian valoron; sed pri tio ni parolos poste.

1. Ideoj kunligeblaj kun eklerno kaj uzado de Esperanto

1.1 La kialoj, pro kiuj homoj lernas kaj uzas ĝuste Esperanton kaj ne aliajn lingvojn, ĝenerale grupigeblas en tri kategorioj:

- utilecaj kialoj,
- ideologiaj kialoj,
- lingvistikaj kialoj.

1.1.1 Utilecaj kialoj estas tiuj de homoj, kiuj lernas Esperanton, ĉar ĝi estas utila por atingi difinitajn praktikajn privatajn celojn. Ankaŭ ĉi tiuj kialoj estas pludivideblaj en du apartajn klasojn: utileco pro ekzisto de parolantaro de la lingvo (pro ekzisto de ia „merkato"), kaj utileco pro la ecoj mem de ĉi-tiu lingvo (struktura facileco ktp.)

En la granda klaso estas ĉiuj homoj, kiuj lernas ĝin pro pure privataj celoj, temu pri kolektado de poŝtmarkoj, trovado de knabino en internaciaj kongresoj, somerumado malmultekosta eksterlande, aŭ io alia. Same, kiel ni vidos poste, multaj neesperantistaj instancoj uzas Esperanton ĝuste pro nura ekzisto de ĝia parolantaro.

Pri ĉi-tiu flanko de la afero sufiĉas rigardi kelkajn propagandilojn eldonitajn de asocioj kaj grupoj esperantistaj, por kompreni la gravecon de la praktikaj avantaĝoj. Cetere, ni enmetas en ĉi-tiujn praktikajn avantaĝojn ankaŭ trovadon de socia medio, de amikaro, kun kiu rilati. Ankaŭ turismo, ekzemple, estas parto de la praktikaj avantaĝoj. Ties gravecon oni komprenas, se oni konsideras ke la turisma Esperanto-kalendaro por ekzemple 1976 listigas 124 turismajn aranĝojn (kaj ili estas nur la plej gravaj). (4)

En la dua klaso estas la homoj, kiuj insistas pri la strukturaj ecoj de la lingvo mem. Oni argumentas ke Esperanto estas pli facila, pli racia, ol ĉiuj ceteraj lingvoj. (Tio, cetere, estas parto de la ĝenerala minimuma ideologio de la Esperanto-parolantaro.)

Tiajn argumentojn ofte eldiras, ekzemple, Helmar Frank en FRG, kiu klopodas per pure raciaj argumentoj konvinki homojn lerni Esperanton (ĉar la suma nombro de horoj necesaj por lerni ĝin estas malpli alta ol la suma hornombro necesa por lerni alian same efikan lingvon.) (5)

Ankaŭ Antal Münich (Muniĥ), por trovi alian ekzemplon, klopodas pruvi en Hungarujo ke komputilaj firmaoj devas uzi Esperanton, ĉar ĝi pro strukturaj ecoj estas racie la plej taŭga solvo en komunikado inter homo kaj komputilo.

Similaj argumentoj reeĥas ankaŭ en deklaroj de gvidantoj de gravaj esperantistaj organizaĵoj. UEA daŭre insistas pri la ŝpareblecoj de UNo, UNESKO ktp., kiuj konkretiĝus per uzado de Esperanto. Ankoraŭ en parolado farita en Lucerno dum la 64-a Universala Kongreso H. Tonkin, la tiama prezidanto de UEA, diris ke la movado ellaboru „... du diversajn strategiojn, unu ĉefe direktita al la industriaj landoj (kiuj kontribuas la plej grandan sumon por subteni UN-on kaj Uneskon), la alia direktita ĉefe al tiuj membro-ŝtatoj, kies lingvoj ne estas nuntempe uzataj en la laboro. La unua devas emfazi la kostojn; la alia devas emfazi la diskriminacion." (6)

Same en 1979 la 12-a konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj en socialismaj landoj alprenis „komunan starpunkton", kiu tekstas:
„En la epoko de la scienco-teknika revolucio Esperanto, kiel komunikilo por la sciencaj kaj teknikaj konoj, povas kaj devas grave kontribui, ke la scienco pli efike iĝu produkta forto." (7)

Oni devas rimarki ke tiaj ideoj, tia insistado pri la nur-utileca-teknika flanko de Esperanto estas io tro malnova en la Esperanto-movado. Jam en la unua kongreso en Bulonjo estis akceptita la fama Deklaracio pri Esperantismo, kiu klopodis limigi la kunligon de Esperanto kun aliaj idealoj, kaj, do, insistis pri la nura praktika utileco de Esperanto. Ni memoru ke inter la ĉefaj apogantoj de la deklaracio estis De Beaufront (De-Bofron), kiun Drezen epitetas „jezuisto kaj obskurantulo". (8) Tiom por diri ke ofte troa insistado pri la nur il-eca karaktero de Esperanto kaj de ties movado kaŝas emon preteratenti la politikajn-sociajn flankojn de la movado por internacia neŭtrala lingvo.
Tio estas la danĝera kontraŭflanko al la emociisma sinteno de Zamenhof kaj de siaj „intern-ide-anoj" kiuj emas vidi precipe nur la mond-savajn ecojn de la lingvo internacia.

1.1.2 Tuj kiam ni forlasas la kampon de utileca uzo de Esperanto kaj klopodas trovi komunajn kunligajn idealojn, kiuj validu por la tuta Esperanto-parolanta komunumo, ni renkontas grandajn malfacilaĵojn. Ĉu fakte ekzistas kelkaj ideoj, ni ne parolu pri ideologio (ide-sistemo), komunaj je ĉiuj esperantistoj?
Tre zorga analizado de la itala esperantistaro, al ni bone konata, kaj komparoj kun eksterlandaj esperantistoj, kondukis nin al la konkludo ke nur io minimuma, tre limigita, komunas por ĉiuj. Tio estas: ĉiuj esperantistoj konsentas pri tio ke planlingvo eblas, ke ĝi bonas por la homaro, ke Esperanto disvastigindas. Tio estas la 1-a ŝtupo de la bildo en 1.2. Eĉ pri ĉi tiu ideo parto de la homoj kiuj lernis Esperanton, kaj utiligas ĝin por privataj celoj, ne tute konsentas.)

Se ni klopodas plukonstrui sur ĉi tiu komuna bazo, ni vidas ke tuj ekestas tre profundaj malsamecoj, ĉar ĉiu esperantisto estas influata de sia „eksteresperantuja" ideologio kaj mondpercepto.

Kiel duan ŝtupon ni trovas, fakte, ian tre nebulan esprimon de ideoj pri interindividua frateco, homa frateco, homeca internaciismo ktp. Ĝenerale, portantoj de tiaj ideoj rifuzas plu analizi la implicaĵojn de tiuj ideoj en la praktika internacia vivo, kaj, kiam ili faras tion, oni tuj vidas, ke malantaŭ tiuj ĝeneralaj vakuaj esprimoj kaŝiĝas tute malsamaj subkomprenitaĵoj, ĉar, ekzemple, por katoliko „homa frateco" ne implicas „justecon inter la fratoj" aŭ „egalecon inter homoj", dum tio memkompreneblas por marksisto. Por kelkaj politike reakciaj esperantistoj, kiuj tamen parolas pri „paco", tiu koncepto simple kaŝas deziron pri pluvivo de la „nuna situacio", evito de „malordo", evito de „klasbatalo" ktp.
En ĉi tiu dua ŝtupo troviĝas preskaŭ ĉiuj grandaj „neŭtralaj" organizaĵoj. Ni vidos ekzemplojn en postaj sekcioj, kiam ni pritraktos la statutojn de UEA, de TEJO kaj de Itala Esperanto-Federacio.

Post ĉi tiu dua ŝtupo, sur la tria, do inter tiuj kiuj plu-analizas la soci-politikajn implicaĵojn de ideoj pri monda frateco ktp., ni trovas plurajn malsamajn evoludirektojn, kiuj estas inter si tute ne akordigeblaj. Unuflanke staras Zamenhof, kiu emfazas la rolon de religio. Do, li opinias ke neŭtrala lingvo kaj neŭtrala religio estas nepraj iloj por monda kaj genta (-etna) frateco, ĉar li vidas en lingvaj kaj religiaj baroj la kaŭzojn de gentaj malpacoj. (Kompreneble Zamenhof ne estas tiel facile klasigebla, kaj Drezen mem tre multe nuancas siajn pritaksojn de la Zamenhofaj ideoj, ĉar en kelkaj paroladoj, kaj precipe en la lastaj jaroj, Zamenhof pli kaj pli montras ekkomprenon de la limoj de lingvo kaj religio kiel estigantoj de internaciaj problemoj. „Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio, aŭ alia socia klaso, ol mi, mi rigardas kiel barbareco." (9)
Apud Zamenhof, en ĉi tiu emfazado de religiaj malsamecoj, kaj en la kunligo inter Esperanto kaj religiaj konceptoj, estas kelkaj movadoj kiel la Bahaa Esperanto-Ligo, Oomoto kaj la brazilaj spiritistoj.
Duan lokon okupas homoj, kiuj aparte emfazas la interŝtatan justecon kaj la neceson uzi Esperanton, kaj ĝuste Esperanton, por certigi justecon inter reprezentantoj de diversaj ŝtatoj. Inter tiuj ni povas lokigi ankaŭ Lapenna-n, kaj certe la okcidenteŭropajn federistojn.

Trian lokon okupas kelkaj, malmultaj, homoj, kiuj kunligas Esperanton kaj strebadon por liberigi ĉiujn etnojn (ankaŭ interne de ŝtataj limoj) kaj permesi utiligon de ĉiuj etnaj lingvoj je loka nivelo. IKEL (la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) estas la tipa reprezentanto de ĉi-tiuj ideoj.

Kvaran lokon okupas kelkaj homoj, kiuj kunigis ideojn pri kontraŭimperiismo kun Esperanto kaj produktis ideojn pri kontraŭimperiisma luktado en lingva tereno (kontraŭ-lingvoimperiismo.) Reprezentantoj de tiu tendenco naskiĝis ĉefe en la rondo de TEJO-KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) kaj pluagas en kelkaj okcidenteŭropaj landaj asocioj.

Tute apartan lokon okupas Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Komence ĝi kunigis Esperanton kaj konceptojn pri formortado de ŝtatoj. En la novembra numero de la jaro 1920-a de la revuo „Esperantista Laboristo" tiuj konceptoj estas klare esprimitaj:

„... La demando estas jena: ĉu la nacioj estas la lasta grado de la evoluo de la homaj socioj? Ĉu do, kiam unu sola helpa lingvo estos parolata de ĉiuj en la mondo, oni devos tamen ankoraŭ konservi la nunan formon por la rilatoj inter la homgrupiĝoj? Kiu aŭdacus respondi jese? ... Sed ĉar ni estas *samlingvanoj*, ni volas tuj profiti tiun rimedon, por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio." (10)

Nun SAT fariĝis tre pli malfacile analizebla asocio, kie pluvivas ĉiuj utopiaj konceptoj pri nova monda ordo, kune kun anarhiismo kaj la origina sennaciismo.

Ĉiuj diritaj „skoloj" produktis originalajn fandaĵojn de Esperanto kaj aliaj ideologioj. Por kompreni kiom ĉi-tiuj teoriaj „fandaĵoj" diferencas inter si, sufiĉas konsideri ke spiritistoj pravigas la uzon de Esperanto pro la mediumaj ecoj de Zamenhof, dum kontraŭlingvimperiismuloj pravigas la uzon de Esperanto surbaze de politika analizo de la monda situacio, kiu similas je tiu far la nealianciĝintaj landoj.

Alispeca ekzemplo estas la kazo de kristanoj kaj komunistoj, kiuj ĝis nun, laŭ nia scio, ne kunligis teorie Esperanton kaj siajn ideologiojn, ne pravigas uzadon de Esperanto per sia propra ideologio. Do, ili tenas siajn celojn disaj, kiel ni ekzempligos poste.

1.1.3 Ekzistas, fine, homoj, kiuj lernas la Internacian Lingvon, ĉar ili interesiĝas pri lingvoj kaj lingvistikaj demandoj. Inter ili troviĝas ĉiuj sciencistoj, kiuj, per Esperanto, observas la funkciadon de planlingvoj kaj de la rilatantaj problemoj.

Tiu homgrupo tre gravas por plua evoluo de la movado por internacia planlingvo, kvankam eble oni foje supertaksas ĝian gravecon. (11).

Pri ili vidu ankaŭ nian postan subĉapitron 2.3.

1.2 Skemo. Nun ni klopodas per skemo prezenti la ideologiojn kunligitajn de la uzantoj de Esperanto, kun Esperanto mem aŭ kun la movado por ĝi.

Jam en la antaŭaj sub-ĉapitroj ni aludis je la signifo de la ideaj ŝtupoj.

2. Por-esperantaj organizaĵoj: celoj kaj idearoj

Ni vidu nun, kie situas, rilate la antaŭan teorian skemon, por-esperantaj organizaĵoj, t.e. tiuj organizaĵoj kiuj difinas sia ĉefa tasko disvastigon de Esperanto. Kaj ni komencu, kompreneble, de la plej ĝeneralaj: UEA kaj TEJO.

2.1 UEA/TEJO. Ni analizu unue la statuojn. Laŭ la nun valida statuto de UEA, la celoj de UEA estas:

„a. Disvastigi uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
b. Plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvoj" (12)

Tiujn celojn ĝi klopodas atingi, interalie, ĉar ĝi klopodas:

„... Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj." (13)

En la statut-projekto submetota al aprobo de la membraro en la venonta jaro estis aldonita la celo:

„b. Agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, kaj faciligi la internacian komunikadon" (14)



TEJO, la junulara sekcio de UEA, laŭ sia statuto havas la samajn celojn de UEA, je kiuj ĝi aldonas nur okupiĝon pri:
„la nuntempaj problemoj de la junularo kun speciala konsidero al internacia lingva komunikado." (15)

Se ni limigus nin je la cititaj tekstoj, UEA estus esence organizaĵo, kiu ĉefe difinas sin disvastiganto de Esperanto. Do, ĝi ne havas propran idearon krom tiu minimuma akceptebla por la tuto de la Esperanto-parolanta komunumo: tial ĝi situas en la unua ŝtupo. Je tio aldoniĝas, en la malnova statuto, nur ideoj pri interhoma solidareco, kiuj estas en la dua ŝtupo montrita de ni: la ŝtupo de ĝenerale nebulaj ideoj pri inter-homa rilatado. En la nova statut-projekto de UEA timeme enŝoviĝas aludo je la „lingva problemo en internaciaj rilatoj", kio montras ke UEA pretas ekrigardi ankaŭ la ne-nur-individuajn lingvajn problemojn.
Sed, memkompreneble, statutoj estas io, kaj realo estas alia! Se ni rigardas la sintenon de UEA-gvidantoj, ni trovas ke jam Lapena estis alveninta al ideoj pri interŝtata egaleco, kaj ke la nuna estraro jam komprenas la socian dimension de lingvo, kaj la politikajn implicaĵojn de Esperanto.
Ni citu, inter multaj citeblaj tekstoj, nur tekston de la redaktoro de la revuo de UEA:
„... ĉar batali por Esperanto signifas batali por lingva egaleco, por digno, kaj por tiuj implicitaj lingvaj (homaj) rajtoj el la Deklaracio, kiam ni do laboras por Esperanto, ni jam troviĝas en la mezo de la batalkampo por la homaj rajtoj" (16)
Aliflanke, en la nuna estraro de UEA tute malaperis ideoj pri Esperanto, kiel magia solvilo de ĉiaj homaj problemoj. Ĉiu kiu legas la lastjarajn paroladojn de la nuna prezidanto de UEA trovas plurloke klarajn indikojn pri la kompreno, ke lingvaj problemoj estas nur part(et)o de la homaj problemoj, kaj ke Esperanto estas potenciala solvo nur de lingvaj problemoj. Asertoj pri la mistera forto de Esperanto kaj pri la solvo de mondaj problemoj, kiel sekvo de solvo de lingvaj problemoj tute forestas.
Se, aliflanke, ni rigardas la UEA-membraron, ni trovas la tutan troveblan gamon de esperantistoj. Ĝenerale, laŭ nia impreso, la membraro estas proporcie tre pli multe influata de la ideoj de antaŭaj estraroj. Do, ĝi ideologie troviĝas iom malpli alte ol la estraro. Ĉi-rilate indus detala analizo pri la membraro de UEA. Pro spaco-manko ni simple resendas al la studoj, ekzemple de P. Forster (17), cetere kompletigindaj, laŭ kiuj UEA-membraro ĉefe interesiĝas pri eblecoj de personaj rilatoj en la movado mem.

2.2 Landaj Asocioj. Pro tio, ke esperantistoj estas anoj de siaj socioj, iliaj ideoj influatas far la regantaj ideoj de tiuj socioj. Tio influas ankaŭ ilian sintenon, kiam ili okupiĝas pri Esperanto.
Birdokula rigardado de statutoj kaj revuoj de Landaj Asocioj montras tute klare ke okcidenteŭropaj landaj asocioj difinas sin ĉefe kiel la malnova UEA, tio estas, kiel nuraj disvastigantoj de Esperanto. Ekzemple, la statuto de Itala Esperanto-Federacio insistas pri tio, ke ĝia „... nura celo..." estas „... disvastigi la internacian lingvon Esperanto" (18)
Same pluraj statutoj de lokaj esperantistaj grupoj paŭsas tiujn celojn kaj foje aldonas kelkajn nebulajn esprimojn pri homa frateco.

En socialismaj landoj, apud la celo pri disvastigo de Esperanto, oni aldonas celojn kiuj estas en konsento kun la ideoj regantaj en tiuj landoj pri internaciismo, malstreĉiĝo kaj paco; kiuj, cetere, tre bone akordiĝas kun la celoj de la ĝenerala Esperanto-movado. Ekzemplocele ni citu la decidon de la Tutsovetia Fonda Konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj:
„Dekretante la fondon de la Asocio de sovetiaj esperantistoj, la Konferenco DECIDAS:
1. Konsideri ĉefa tasko de la Asocio kaj ĝin enirantaj esperantistaj organizaĵoj partopreni, helpe de la lingvo Esperanto, en firmigo de amikeco kaj evoluigo de kulturaj ligoj de la sovetia popolo kun popoloj de eksteraj landoj por interesoj de firma paco, sekureco kaj kunlaboro; helpi al esperantistoj pri studado aŭ profundigo de scioj de la lingvo Esperanto; eduki ĉe la sovetiaj esperantistoj la sentojn de patriotismo kaj internaciismo, nekompromisemo al reakcia ideologio, al faŝismo, koloniismo, rasa diskriminacio kaj socia maljusto. La Asocio kontribuos al evoluigo de la internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj kaj kunordigos la agadon de lokaj Esperanto-organizaĵoj en la interna kaj internacia sferoj." (19)

Sed oni devas tre klare emfazi, ke en aliaj landoj, kie la politika „klimato" estas alia, esperantistoj kutime adaptas sin al la medio. Krom la konataj ekstremaj kazoj de faŝismiĝo en faŝismaj landoj antaŭ la 2-a mondmilito, ekzistas pluraj mezvojaj kazoj ankoraŭ nun.

2.3 Pri-esperantaj aŭ pri-lingvopolitikaj agadoj. Inter la homoj kiuj lernas Esperanton pro intereso pri lingvikaj problemoj, elstaras kelkaj esperantistoj (sciencistoj, kiuj okupiĝas pri scienca studado de la fenomeno „Esperanto".)
Pro sia scienc-objektiva karaktero ili difinas sin kaj siajn institucioj kiel pri-esperantajn aŭ pri-interlingvikajn okupiĝantojn. Kiam ili sukcesas kuntreni ankaŭ neesperantistojn, objektiveco estas eĉ pli certa.
Necesas mencii ĉi-rilate CED, universitaton Eötvös Lóránd (Etveŝ Lorand) en Budapeŝto, la problemgrupon en la Soveta Scienca Akademio ktp.
Ĉi tiuj homoj, tamen, ne estas, nek ili devas esti, kreantoj de ideologioj pri aŭ por Esperanto-movado.

3. Per-esperantaj organizaĵoj
Ĉu la per-esperantaj organizaĵoj ideologie diferencas de la por-esperantaj?
Necesas distingi ideologi-markitajn fakajn organizaĵojn (kies celo estas klare kunligita kun difinita politika idearo), kaj ne-ideologiajn organizaĵojn (kiuj okupiĝas pri teknikaj, partaj demandoj).

3.1 Ideologi-markitaj fakaj organizaĵoj. Kelkaj, eĉ grandaj kaj gravaj, fakaj organizaĵoj simple *apudmetas* du sendependajn celojn kaj ne klopodas unuigi ilin.
Inter ili ni esploru iom pli detale MEM kaj IKUE, do la asociojn de pacemuloj kaj katolikoj.
MEM kunigas ĉefe komunistajn pac-emulojn, kiuj difinas la kondiĉojn por paco laŭ komunistaj analizoj. La tria artikolo de MEM-statuto klarigas ĝiajn specifajn celojn jene:
„a. *Kiel unua kaj ĉefa tasko,* instigo al ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj partopreni la defendon de la paco, kune kun registaraj kaj neregistaraj organizoj (politikaj, sindikataj, porpacaj, religiaj, kulturaj, kc... sur la

bazo menciita en artikolo 2, kaj notinde kun Monda Packonsilantaro kaj ties landaj, regionaj kaj urbaj sekcioj.

b. Surbaze de tiu kunlaboro en la porpaca batalo fare de esperantistaro, instigo en oportuna momento al la menciitaj organizoj utiligi Esperanton por siaj internaciaj rilatoj, paralele kun naciaj lingvoj, kaj senatende utiligi Esperanton en la servo de la pacbatalo." (20)

Do, klare, Esperanto kaj paco estas du aĵoj same valoraj kaj antaŭenigendaj, sed ankaŭ senrilataj.

Tiu senrilateco evidentas ankaŭ en la enhavo de revuo Paco, kie apud-estas du tute sendependaj enhavoj. Unuflanke politikaj artikoloj pri pacmovado kaj pri mondaj okazaĵoj, kaj, aliflanke, pure prilingvaj artikoloj. Analizo de la artikoloj en la numero 4 de 1979 de Paco indikas ke apud 5 pripolitikaj artikoloj, troviĝas 3 prilingvaj artikoloj, 4 primovadaj artikoletoj, kaj 3 noveloj.

Saman bildon montras IKUE.

Ĝia 2-a statut-artikolo parolas pri la celo de la asocio jene:

„IKUE celas certigi katolikan ĉeeston en la antaŭenironta Esperanto-movado; ĝi intencas promocii studadon kaj praktikadon de la internacia lingvo Esperanto en religia, pedagogia, beletristika kaj scienca temoj, laŭ la katolika kredo." (21)

Analizo de la enhavo de la numero 5 de 1979 de Espero Katolika ankaŭ montras apud-eston de artikoloj pri religiaj temoj (10), pri-movadaj temoj (8) kaj prilingvaj temoj (1).

Pri la kunigo de Esperanto kaj aliaj politikaj ideoj far etnistoj kaj SAT-anoj ni jam parolis kaj ne necesas pli longe nun pritrakti asociojn kiel IKEL kaj SAT. Ni nur rimarku, ke tio tamen montras ke ekzistas ideologimarkitaj asocioj kiuj kunligas Esperanton kaj aliajn idearojn.

3.2 Ne-ideologiaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ la peresperantaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri pure „teknikaj" demandoj, ekde aŭtomobilistoj ĝis filologoj, apudmetas du celojn.

Unuflanke ili celas kunigi esperantistajn samfakulojn kaj tiel ebligi peresperantan samfakan kunlaboron.

Aliflanke ili celas disvastigi Esperanton inter neesperantistaj samfakuloj (kaj tiucele pretigas fakajn terminarojn, revuojn ktp).

Ĉi tiuj du apudmetitaj celoj klare evidentas en la celdeklaroj de pluraj fakaj asocioj. Ni citu nur kelkajn. Internacia Naturista Organizo Esperantista celas „... diskonigi la naturistajn ideojn en la esperantistaj medioj; disvastigi la uzadon de Esperanto en la naturistaj medioj" (22). IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) deklaras sian intencon „... disvastigi la uzadon de Esperanto inter fervojistoj... interkonatigi... fervojistojn, scipovantajn aŭ lernantajn Esperanton." (22)

Oni povus tiel daŭrigi pri ĉiuj „teknikaj" fakaj asocioj. Do, neniu el ili antaŭenigas ideologion, kiu estu super la nivelo de la minimumo akceptebla far ĉiuj Esperanto-parolantoj. Ilia vera originaleco kaj viv-pravigo konsistas el perado de Esperanto al fakaj medioj.

Finfine ili estas *por*-esperantaj organizaĵoj, kie „per-esperant-eco" estas ilo por pli efika disvastigo de Esperanto.

4. Neesperantistaj uzantoj de Esperanto kaj de Esperanto-movado

Neesperantistaj uzantoj de Esperanto aŭ de la esperantlingva komunumo estas homoj aŭ instancoj, kiuj nur uzas ĉi-tiun lingvon, kiel ili uzas aliajn lingvojn.

Ili estas homoj kaj instancoj kun propraj celoj, ideologioj, ktp, kiuj nur utiligas la komunikeblecon de Esperanto. Do, ili kiel instancoj neniel celas disvastigi la lingvon aŭ apogi ĝin.

Kiam firmao Fiat eldonas en Esperanto faldfolion pri novaj aŭtomobiloj, ĝi nur celas vendi tiujn aŭtomobilojn. La saman faldfolion ĝi eldonas ankaŭ en la hispana, franca ktp.

Kiam la Pekina Fremdlingva Eldonejo eldonis verkojn de Maŭ Zedong en Esperanto, ĝi nur celis propagandi maŭismon.

Kiam Radio Varsovio parolas en Esperanto pri novaj polaj atingoj en konstruado de socialismo, ĝi nur celas informi pri Polujo.

En la plej multaj kazoj tiaj utiligoj estas rigardindaj nur kiel agnoskoj de la forto de la Esperanto-parolanta komunumo. Ili neniel rigardindas kiel miksaĵoj de la ideologio de la uzanto kun la ideologioj de esperantistoj. Se mi uzas la araban por propagandi, ekzemple Esperanton, pro tio mi ne iĝas islamano.

Kvankam ĉi tio ŝajnas klara, ni devas ĉiam ĝin substreki, ĉar multaj esperantistoj havas la fortan emon kredi ke uzantoj estas ankaŭ (aŭ iĝas) esperantistoj.

Alia afero estas nia klopodo por ke ne-esperantistoj uzu Esperanton. La „fina venko", cetere, okazos kiam ĉiuj neesperantistoj uzos Esperanton, sen samtempe iĝi esperantistoj laŭ la nuna senco.

5. Diskutproponoj

Surbaze de tio, kion ni ĝis nun diris pri la Esperanto-movado, ni prezentas nun kelkajn proponojn diskutigajn kaj eĉ provokajn.

5.1 Pri nur-utilecaj argumentoj. La fina celo de la Esperanto-movado estas uzado de Esperanto en ĉiuj kampoj kaj des pli en scienca kampo. Pro tio favorado de praktika apliko de Esperanto estas memkompreneblaĵo por esperantistoj. Nur per praktika apliko la granda utileco de la internacia lingvo povas klare evidentiĝi.

Tamen, en la nuna momento, Esperanto objektive ankoraŭ *ne* estas tiom utila. Malgraŭ ĝia facileco kaj la minimuma investado necesa por lerni ĝin, la rilato inter investado kaj utileco estas evidente tre pli alta ol por la ceteraj „grandaj" lingvoj. Ĉiu ajn homo, kiu lasas sin gvidi nur de utilecaj, ekonomiaj kriterioj, plej bone investas sian tempon por lerni la anglan aŭ la rusan aŭ la francan ktp.

Do, se oni volas konvinki homon, kaj precipe scienciston, lerni Esperanton (kaj oni ne volas trompi lin), oni devas uzi ankaŭ alispecan argumentadon.

En la nuna momento propagandado de Esperanto per *nur*-utilecaj argumentoj (kio bedaŭrinde okazas ankaŭ en progresemaj medioj) estas malĝusta, aŭ almenaŭ nesufiĉa, precipe se ni proponas la internacian lingvon al politike engaĝitaj homoj aŭ instancoj!

Al homoj kaj instancoj, kiuj estas politike maldekstraj (en la okcidenteŭropa signifo de „maldekstro"), oni devas proponi Esperanton per argumentoj kaj utilecaj kaj ideologiaj. En ĉi tiu kazo ideologiaj argumentoj estu koheraj kun la politikaj ideoj de la alparolatoj, kaj do oni ne rajtas uzi

la nebulan „internan ideon", sur kiu baziĝas tiom da esperantistaj varbklopodoj.

5.2 Neceso kunligi Esperanton kaj ideologiajn elektojn minimume en fakaj ideologi-markitaj organizaĵoj. En 5.1 ni parolis pri la neceso uzi ideologiajn argumentojn en la disvastigo de Esperanto en progresemaj medioj. (Sub la nocio „progresemaj medioj" ni komprenas kaj orienteŭropajn socialismajn homojn kaj instancojn kaj okcidentajn maldekstrulojn kaj triamondajn kontraŭkoloniistojn).

En 3.1 ni estis substrekintaj ke ideologi-markitaj fakasocioj tenas siajn du celojn disaj. Do, ili ne klopodas sisteme kunligi la politikan celon de la medio en kiu ili agas kun la celo disvastigi Esperanton.
Ĉu, tiel agante, ili atingas la dezirindajn rezultojn?

5.3 Elektado de lingvo estas politika afero. En 0.2 ni diris, ke gramatikaj strukturoj ne entenas ideojn, ke ideoj estas en la kapoj de la homoj kaj ne en la lingvoj per kiuj tiuj homoj parolas.
Necesas tamen fari du gravajn rimarkojn.

Lingvo estas ilo per kiu en la praktiko esprimiĝas ĉefe difinita kulturo, la kulturo de ĝia parolantaro. Kvankam lingvo en si mem estas neŭtrala ilo, ne eblas nei ke per la angla esprimiĝas ĉefe la nuntempa usona kulturo dum per la svahila esprimiĝas alia kulturo (de orientafrika bordo.). Ĉi-rilate, do, ne estas sensignife, ĉu oni elektas uzi la anglan aŭ la svahilan por lernado, uzado ktp, ekzemple en Tanzanio, Kenjo.
Ni kredas ke ne necesas plue emfazi ĉi tiun punkton. Sufiĉas pensi pri la „lingvo-luktoj" en multaj mondopartoj kaj pri la solvo de la problemo de elekto de uzotaj lingvoj, pri kiu parolis kaj agis Lenin.
En tiu senco oni povas aserti ke se oni elektas uzi Esperanton (aŭ cetere, iun ajn alian lingvon) oni plenumas politikan agon. La elekto de Esperanto certe estas tute neneŭtrala ago. Neŭtraleco, ĉi-kampe, postulus respektadon de la ekzistantaj lingvaj kutimoj je internacia nivelo.

Pro tio ke ĝi estas politika ago, elekto de Esperanto postulas politikan pravigon.

Alia rimarko rilatas precipe la strukturajn ecojn de planlingvoj.
Ĉe ili ankaŭ la plan-maniero ne estas neŭtrala, sed sekvo de iu mondkoncepto de la plananto. Elekto de difinitaj vortoj, de ilia semantika kampo, de retorikaj figuroj ktp. ja havas politikan signifon.
Pensu pri la relativa internacieco de Esperanto, kiu estas preskaŭ nur en-eŭropa, kaj malmulte atentas ne-eŭropajn kulturojn (ne temas nur pri vortaro, sed ankaŭ pri kulturaĵoj kunligitaj kun Esperanto).

5.4 Kiusence esperantistoj povas esti neŭtralaj? Esperantistoj rajtas esti neŭtralaj nur rilate la valoron de malsamaj etnaj (naciaj) kulturoj. Ekde la unuaj tempoj de la movado oni rediradis ke por esperantistoj malsamaj „gentoj" havas saman valoron.
Sed certe esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj antaŭ elekto de difinitaj lingvoj kiel internaciaj komunikiloj.
Ĉu do esperantistoj povas esti neŭtralaj antaŭ la disvastiĝo de la angla lingvo? Kaj ĉu ili povas esti neŭtralaj ĝenerale pri kultura imperiismo (kaj pri imperiismo ĝenerale)?

Same kiam temas pri internaciaj problemoj, kiuj rekte tuŝas la eblecojn de internacia komunikado, esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj. Ĉiuj verŝajne konsentas ke esperantistoj ne rajtas esti neŭtralaj inter milito kaj paco.

5.5 Ĉu komunistoj rajtas esti neŭtralaj rilate lingvo-elekton? Ŝajnas al ni ke en internaciaj rilatoj komunisto estas iu, kiu volas atingi ankaŭ pli justajn rilatojn inter diversaj gentoj.
Pro tio komunistoj ne favoras imperiismon aŭ superregon de unu lando je alia lando.
Konsekvence komunisto ne rajtas favori iun ajn superstrukturaĵon kunligitan kun imperiismo. La uzo de lingvo en internaciaj rilatoj estas superstrukturaĵo kunligita kun la speco de strukturaj rilatoj, kiuj establiĝas inter landoj.
Sekve komunisto devas favori Esperanton (aŭ similan planlingvon), ĉar ĝi estas rimedo por atingi pli justajn rilatojn (minimume je superstruktura nivelo) inter „fortaj" kaj „malfortaj" landoj.

Bibliografiaj notoj

(1) D. Blanke (red.) Socipolitikaj aspektoj de la Esperantomovado. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1978, paĝo 200
(2) A. Kostallari: La langue litteraire albanaise contemporaine et les problèmes fondamentaux de son orthographe. En Studia Albanica, 1/1973, pĝj 36-37
(3) M. Isajev: Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj. En Moskow News, aldono al n. 16/1979, pĝ 16
(4) T. Tyblewski: Internacia Turismo de la Parolantoj de Esperanto. En Esperanto-dokumentoj 6. pĝ 5
(5) Komparu ĉi-rilate la verkojn de H. Frank en Esperanto kaj en la germana.
(6) H. Tonkin: Mi retiriĝos por resti. En Esperanto 10/79
(7) Laŭ raporto en Budapeŝta Informilo, aprilo/majo 1979
(8) E. Drezen: Zamenhof. Mospoligraf, Moskvo 1929, pĝ 21
(9) kiel (8), pĝ 13
(10) Historio de S.A.T. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1953, pĝj 12-13
(11) kiel (1), pĝj 185-186
(12) Statuto de UEA. Roterdamo 1968, pĝ 3
(13) kiel (12)
(14) Cirkulero al komitatanoj de UEA, dissendita en oktobro 1979
(15) Statuto de Tutmonda Esperantista Organizo, TEJO, Belgujo 1978
(16) S. Milojeviĉ: Esperanto mem estas homa rajto. En Esperanto 11/78
(17) P.G. Forster: L' esperanto come movimento sociale e linguistico. En Pensio e Linguaggio in Operazioni, 7-8/julio-decembro/1971
(18) Federazione Esperantista Italiana, Statuto, presejo Impronta, Torino, sen dato
(19) Decido de la Tutsovetia Fonda konferenco de la Asocio de sovetiaj esperantistoj. En Moscow News, aldono al n. 16/79, pĝ 13
(20) Statuto de Mondpaca Esperantista Movado (M.E.M.). En la Pacaktivulo, 113/1978
(21) Statuto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. En Jarlibro 1967-68, IKUE, Nederlando 1968, pĝ 56
(22) Komparu: Jarlibro 1979, UEA, Roderdamo 1979, ekde pĝ 39

PANORAMO

Bonaj najbaroj

La rilatoj inter Aŭstrio kaj Hungario dum la lasta jardeko fariĝis plene amikaj kaj intimaj, pruvante, ke ankaŭ landoj kun malsama socia sistemo povas fruktodone kunlabori. Tiasence la aŭstra-hungara kunlaboro gravas ne nur por la koncernaj du landoj, sed ĝi havas signifon pli vastan en la internacia vivo de la Eŭropa kontinento.

Komence de oktobro György *Lázár*, ĉefministro de Hungario faris oficialan viziton al Aŭstrio. Kun kanceliero Bruno *Kreisky* li pritraktis diversajn kampojn de la aŭstra-hungara kunlaboro. En la spirito de la nuna situacio, la plej grandan atenton ricevis ekonomia kunlaborado.

Estas menciinde, ke dum la lastaj du jaroj senescepte ĉiuj samfakaj ministroj de la du registaroj havis personan kontakton unu kun la alia.



Savita brutospeco

Ĉiu bestospeco estas gardinda trezoro de la tuta homaro. Tamen, multaj brutospecoj formortas pro la selekto de pli ekonomie bredeblaj novaj specoj.

Iam ĉefa speco de la hungara brutobredado estis la mirinde rezistokapabla *griza bovo*. Tamen, ĝi neniel respondis al la postuloj de la nuntempa mondo, kaj iom post iom ĝi malaperis el la bienoj. Tamen, oni ne volis, ke tiu tipa hungara speco ekzistu nur specimene en zooĝardenoj, tial la ŝtato certigis apartan subvencion por kelkaj agrikulturaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj, kiuj pretis bredi grizajn bovojn inter la kadroj de la ordinara brutobredado.

Sukceso de hungara diplomato

Dum la aŭtuna sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN – la unuan fojon dum la tuta historio de tiu prestiĝa organizaĵo – elektiĝis hungara diplomato kiel prezidanto de la Ĝenerala Asembleo. La novelektita prezidanto estas nia vicministro pri eksteraj aferoj, Imre *Hollai*. Li trapasis ĉiujn staciojn de la diplomatia kariero, kaj tiamaniere li povis kolekti multajn spertojn, kiuj certe necesos por la adekvata plenumo de tiu ĉi honoriga sed ne facila tasko.

PANORAMO

Jubilanta universitato

Antaŭ 200 jaroj, en 1782 estis fondita en Hungario la unua teknika altlernejo kun nomo *Institum Geometrico–Hydrotechnicum:* ĝi estis la ĝermo de la nuna Budapeŝta Teknika Universitato, la plej granda hungara universitato (ĝi havas dek mil studentojn). La nunaj profesoroj kaj studentaro inde festis la gravan jubileon, kun la ĉeesto de multaj eksterlandaj gastoj, eĉ el foraj landoj.

«Ikarus» al Usono

Dum la lastaj jaroj Usonaj urboj aĉetis 185 hungarajn aŭtobusojn. Tio havas fakte nur simbolan signifon, nome, ke la hungara aŭtobusfabriko Ikarus sukcesis aperi sur la tre pretendema Usona merkato. Estas menciinde, ke Hungario estas la plej granda eksportanto de aŭtobusoj – en la tuta mondo.

Paradizo por ĉasistoj

Hungario estas ŝatata celo de eksterlandaj – ĉefe okcident-eŭropaj – ĉasistoj. Cervoj, kapreoloj, aproj kaj leporoj vivas sufiĉe multaj en la hungaraj arbaroj, kaj la aŭtoritatoj certigas favorajn kondiĉojn ankaŭ por elporti la trofeojn el la lando.

Vivnivelo modeste kreskas

De 1979 ĝis nun la hungara preznivelo altiĝis je 34 procentoj, t.e. la averaĝa jara kresko estis ĉ. 8 procentoj. Dum la sama periodo la nominalaj enspezoj de la loĝantaro kreskis je 37 procentoj: la diferenco montras 3 procentan altiĝon de la vivnivelo. Por preskaŭ kvar jaroj tio ne estas tre grandioza kresko, sed inter la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj jam la evito de malkresko povas esti rigardata ne malŝatinda rezulto.

BÜCHER AUS UNGARN – HUNGARIAN BOOK REVIEW LE LIVRE HONGROIS

Kvaronjara Revuo de Unuiĝo de Hungaraj Libroeldonejoj kaj Kolportistoj

– Ĝi informas en tri lingvoj pri ĉiuj gravaj produktoj kaj plenumoj de la hungara spirita vivo,
– donas daŭran superrigardon pri historio kaj arthistorio,
– informas pri la plej novaj rezultoj de la ekonomiaj, sociologiaj, belartaj, muzikaj kaj teknikaj esploroj,
– aperigas intervjuojn, raportaĵojn, novaĵojn, recenzojn,
– prezentas adekvatan, dinamisman bildon pri la hungara kulturo.

La revuo estas abonebla ĉe:

KULTURA Entrepreno pri Ekstera Komerco
H–1389 Budapest
P.O.B. 149
Telefono: 388–511
Telekso: 22–4441

REVUO DE REVUOJ

Kie ajn esperantistoj pasigas siajn feriojn, somerfine ili jam atendas la informojn pri la Kongreso – jes, por ni skribenda per majusklo! Ĉijare – feliĉe – la kongresaj numeroj de ESPERANTO kaj HEROLDO eminente prezentis al ni Antverpenon kaj dankinde, eĉ laŭdinde kvietigis nian sciavidon pri la Kongreso per artikoloj multe pli viglaj kaj legindaj. Vari-tonaj kaj persone nuancitaj rememoroj kun taŭge akcentitaj interesaj momentoj plezurigas la legantojn – kaj la relegantojn; pri kio mi aparte insistas, ĉar abunde troviĝas en ili meditindaj kaj digestindaj pensoj. Ne mankas atentindaj rimarkoj laŭdaj kaj plendaj, nek konsiloj kaj praktikeblaj proponoj por utiligi venonte, plejeble jam baldaŭ en Budapeŝto!

El inter la bonsukcesintaj fotoj mi ellevas – por direkti vian atenton – ne distrajn programerojn, sed du paroladojn. Tiun de la Tunizia ambasadoro *Mustafa Masmoudi,* kiu prezentis: kiel eksterulo vidas jam solvenda la Babel-problemon. Tiun de *William Auld* dum la Esperantologia Konferenco, por koni, kiel la plej kompetenta „internulo" vidas la evoluon de Eo laŭ natura vojo. La prezidanto de nia Akademio elpaŝis *kontraŭ* personaj preferoj kaj *por* la praktiko kaj bezonoj de la esperantista publiko (kio plene akordas kun nia redakcia linio). Li reliefigis ankaŭ la minacon de la kreskanta *angligo* de niaj fakaj terminaroj kaj pledis por eluzo de la aglutinaj kapabloj de Eo. Ĉurnur Eŭropa lingvo? Tamen ne...

Kvankam vere malfacila por Azianoj kaj Afrikanoj, tamen multe pli facila ol aliaj okcidentaj lingvoj, tial Eo devas zorge gardi sian avantaĝon, „ĉar bedaŭrinde Eo fariĝas ĉiam pli komplika kaj malfacile lernebla" – skribas grava ĉina aŭtoro de EL POPOLA ĈINIO (n-ro 5.), kaj tiun danĝeran procedon plene nei mi ne povas. La graveco de la „tria mondo" en nia afero devas esti evidenta por ni ĉiuj, tion ja substrekis *Tibor Sekelj* en ESPERANTO (7-8.), skizante favorajn eblojn en la kadro de la „nealiancitaj landoj", kies ekziston eble surprize prilumis en la sama numero *H. Bakker.* La movado ja dependas de la lingvolernado, kaj ĝi devas esti faciligata de la lingvo mem. Certe, ankaŭ Eo havas, eĉ devas havi la karakterizojn de etnolingvoj – alie ĝi ne estus uzebla lingvo! Tiaj malfacilaĵoj ene de Eo – kiujn *Bernard Golden* analizas en VENEZUELA STELO (26.) kaj aliloke, nepre prave – estas ankoraŭ eraroj, eĉ la skribaj, certagrade estas en ĉiu lingvo (ankaŭ en gepatra lingvo) akcepteblaj, kiel konate, kaj plene ne eviteblaj. Sed oni ne subfosu la konstruaĵon! – kaj tiurilate mi vidas ege gravaj la avertojn de Auld. Ja bezonas IL-on ne nur la nealiancitaj landoj, la tria mondo; bezonas ĝin ankaŭ la internacia katolika eklezio, pri kiu ESPERO KATOLIKA (4.) devas rezignacie konstati, ke la Vatikana interlingvo post la latina ŝajne iĝas la itala, ĉar bezono ekzistas, kaj la itala troviĝas ĉemane...

Troviĝas do vigla kulturo, abundo de publikindaj temoj en la E-gazetaro, kaj ĉio ĉi akre kontraŭdiras la fremdajn riproĉojn pri ia „kulturo-manko" de la Internacia Lingvo – kiu cetere ankaŭ enlingve kunportas jarmilan (eĉ se Eŭropan) kulturon, larĝan skalon de tradicioj diverspopolaj. Kvazaŭ pinĉante sur gitaraj kordoj mi plezure pinĉas-prenas desur la gazetaj temoj: jen SEKSO KAJ EGALECO (9.) skribas – malegale – pri virinoj ne laŭ viraj gustoj, sed laŭ veraj ĝustoj. *Klarvidi* – necesas en ĉia movado, tial estas salutinde ke la bravega *Anna Brennan* konsciiĝas, ke tamen ekzistas malegalecoj inter la seksoj, eĉ pri moralaj konceptoj. Antikvaj grekaj kaj aliaj saĝuloj jam konsciis pri tio; ree inventi ĝin estos tamen konvena en la kleriga agado por transformi tiun duecon.

La historiajn tradiciojn volonte traktanta BULGARA ESPERANTISTO (6.) publikigis pri la grandmerita „bopatro de Esperanto", *A. Zilbernik* – kaj pri liaj infanoj – en inda formo. Neforgeseblaj estas liaj meritoj, ankaŭ kiel unua mecenato de Eo: sen li, tutcerte, Eo hodiaŭ ne ekzistus, sed pri tio ja traktas nia alia rubriko. La artikolo de la diligenta esploristo *Adolf Holzhaus* pliigas niajn konojn pri tiu familio, kies anoj ankaŭ aparte akiris gravajn-bravajn meritojn en disvastigo de Eo.

Post 50 jaroj indas rerigardi kaj honori la iamajn batalantojn – INTERNACIISTO (7-8.) dediĉis abunde multflankan numeron al la revolucia etoso de 1932, kiam disiĝis la E-proleta movado, kaj fondiĝis en la tiama Berlino IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro). Jam premis nigraj nuboj super Germanio kaj super la mondo, la kongreson de IPE ĉirkaŭis policaj persekutadoj kaj minacoj, kiam la ruĝaj esperantistoj disiĝis, tre-tre erare kaj tragike. Samtempe SAT-kongreso en Stuttgart aliris alian vojon, simile al la tragika vojo de la germana laboristaro, ne komprenante unu la alian, la devon historian al la nepra kunmarŝado. Ĉu la defendo de la paco per komuna agado iĝos pli grava por la organizaĵoj kaj por la membraro – ni esperu!

Lokon petas ĉi tie, ankaŭ pro la supre menciitaj, artikolo en SAT-AMIKARO (376.), kiu deziras enprogramigi (pro timo de kreskanta senlaboreco en Francio kaj aliaj landoj) jam nun ian utopian socion. Laboru la robotmaŝinoj, dume ni homoj nur ĝuu la vivon sen laboro (ĝin plene faros la robotoj, ĉu ne?) konsumante la produktojn de la robotoj (tiel ekspluateblaj?). Jen la mirinda solvo de la senlaboreco! Mi insiste proponus al la francaj kolegoj: anstataŭ laŭrealaj diskutoj pri la vivgravaj temoj ne enlasu misorientigajn ĉarlatanaĵojn sur la gazetpaperon, aŭ eventuale, ĉu-ĉu, nur kiel fikcian novelon! Sed, konfesinde, tiu ĉi skribaĵo restas ankoraŭ sub la atentinda novelo-nivelo.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

La rolo de antaŭvido en la akvomastrumo

Ĉe la bazo de ĉiu konscia homa ago, se sukcesa, troveblas taŭga antaŭvido, bone pripensita kaj sistema. Tiel estas ĉe agoj de personoj, same kiel ĉe agoj agadoj de sociaj aŭ ekonomiaj organizoj. Aparte gravas la antaŭvido ĉe la akvomastrumo, ja, ĝia agado multrilate fundamentas la evoluon de aliaj ekonomiaj branĉoj. La akvomastrumo en ĉiu epoko havis determinan rolon kaj tian ĝi havos certe ankaŭ estonte, ĉar ĝi vole-nevole aktive influas la evoluon. Ĝi rezultigas multajn konsekvencojn al la tuta socio, jen pozitive, jen negative, sekve la respondeco de ĝiaj agantoj estas ege granda.

Ĝuste pro sia fundamenta karaktero la efikoj de la akvomastruma agado daŭras ĝenerale dum longa tempo. Pro tio, por la decidoj la akvomastrumo bezonas ĝisfundajn, multflankajn analizojn kaj fidindajn prognozojn. Sen tiuj povas prezentiĝi tre malfavoraj konsekvencoj kun egaj damaĝoj.

Estas alia grava karakterizo de la akvomastrumo, ke ĝenerale ĝi povas teknike konvene kaj sufiĉe ekonomie disvolviĝi nur sur grandaj teritorioj. Se oni neglektas tion – emfazante strikte lokajn interesojn – la sekvoj povos esti grandegaj damaĝoj. Tio validas ne nur enlande, sed ankaŭ ĉe internacian kunlaboron bezonantaj akvomastrumaj aferoj. Estas ekster dubo, ke por taŭga akvomastrumado estas nepra antaŭkondiĉo precize orienti ĝian disvolvon. Kaj tion oni devas bazi sur prognozoj.

Kelkaj pensoj pri la prognozado

De kiam la homo estas homo, li sopiris je antaŭvido. Ekde la antaŭindiko de elementaj, simple ripetiĝantaj fenomenoj pasis multaj jarmiloj ĝis la moderna prognozistiko, paralele kun la longa evoluo de la produktiloj. La konjekteblo de la estonto firmiĝis kune kun la homa regado super la naturo. Sed la scienca prognozo povis komenciĝi nur sur certa nivelo de la natursciencoj.

Por la socia evoluo estas ege grava la disvolviĝo de la produktofortoj – unuavice la scienco –, sekve aparte gravas ties prognozado. Se oni havus almenaŭ proksimumajn konojn pri la teknika nivelo en la jaro 2000 ± n, tiam multe pli facile estus solvebla aro da problemoj en la ekonomio kaj socio.

La prognozistiko havas la taskon prepari la farendojn, kaj por la nuntempo, kaj por la pli-malpli baldaŭa periodo. La agadoj mem apartenas al sferoj de aliaj sciencoj, kiuj okupiĝas pri la „tuja estonto", ekzemple per anticipaj planoj, projektoj, programizado k.a.

La prognozadon mem eblas konsideri laŭ du aspektoj:

– kiel relative precize difinitajn asertojn pri la sociaj perspektivoj, kiujn la socio klopodos efektivigi kaj samtempe sin alĝustigi, aŭ

– kiel aron da estonte eblaj variantoj, el kiuj la socio elektas por si la plej taŭgan varianton – eventuale ĝi provas sintezi kelkajn variantojn.

Favorante la racian perspektivon de la evoluo, ni pli inklinas al la dua aspekto, t.e. al tia koncepto de la estonto, kiu konsideras la estontecon nefermita, altgrade fleksema strukturo. Tie la prognozado havas la celon determini la proksimumajn direktojn kaj indikojn por nia orientiĝo. Dum la kontinua efektivigo de la estonto oni tiujn laŭgrade precizigos kaj modifos. Kompreneble tiujn ŝanĝojn forte influos la dume vastiĝintaj kaj pliprofundiĝintaj scioj, ankaŭ la apenaŭ antaŭvideblaj malkovroj, kiuj prezentos sin

Rivero Tiso: akvonodo ĉe Kisköre



Rezervujo en montaro Mátra

iamaniere en la produktiveco kaj en la modifoj de la vivmaniero de la socio.

Tiel konsiderante la prognozadon, la perspektiva prognozado nuntempe ŝajnas *tre grava.* Ankaŭ kiel metodo kiu almontras la eblojn kaj vojojn por superi la ekonomiajn zorgojn, ankaŭ kiel kompaso por ĝuste orienti tiujn decidojn, kiuj rilatas al longa tempo, sed jam nun estas fiksendaj. Alivorte, la perspektivaj prognozoj devas jam nun inkluzivi la estonte necesajn ĝustigojn, kaj tiamaniere etigi la neevitеblan diferencon inter la antaŭviditaj kaj efektivaj disvolviĝoj.

La scienco kaj la prognozoj pri la evoluo

Kia estas la interrilato de la scienco kaj de la prognozado pri la socia-ekonomia evoluo? La racieco de tiu evoluo iras paralele kun la apliko de la scienco en la perspektivaj prognozoj. Plej grave estas atingi optimuman kombinon de la scienca-teknika disvolvo, de la ekonomia evoluo kaj de la atendeblaj sociaj ŝanĝiĝoj, precipe en la vivmaniero. Tiun ĉi lastan anticipe determini aparte estas grave, ĉar tio ebligas elimini la danĝeron de la memcela ekonomia disvolvo. La scienca esploro havas do bazan signifon, ĉar unuflanke ĝi disponigas rimedojn por superi la kontraŭdirojn inter bezonoj kaj ties kontentigebloj, kaj aliflanke pere de novaj eltrovoj ĝi ankaŭ kreas novajn, ne antaŭvideblajn bezonojn. Tio donas racian direkton al la ekonomia disvolvo. La grava efiko de scienco al la prognozado prezentiĝas ĝuste en tio, ke la scienco direktas racie la longdaŭran disvolvon, tiel minimumigas la distancon inter la planita kaj la efektiviĝinta disvolvo. Jen, kial la perspektiva prognozado devas esti altgrade scienca agado.

La antaŭvido: postulo de nia epoko

En nia epoko, dum multrilate sperteblas perturboj de la natura ekvilibro

Digo konstruiĝas





Pump-stacio (Szarvaskáka)

kaj pereo de naturtrezoroj (ankaŭ de akvoj), la celkonscia antaŭvido ricevas elstaran gravecon. Trafe esprimas tion R. Gillenbach en la verko „La soifa tero": *„La homo, kiam li akiris la povon interveni en la kosman cirkuladon de la akvo, ricevis ankaŭ povon detrui sin mem. Sed, ĉar minacas lin la danĝero de lia pereo, li ne plu povas toleri la spontanean disvolviĝon de la kulturo, kvazaŭ laŭ naturleĝoj. Li devas konscie regi ĝin."*

Indas mediti pri tiuj vortoj. Eblas sen troigo aserti, ke ili devas manifestiĝi en la akvomastrumo, kaj nun, kaj estonte. Akcele kreskas ja pro la socia-ekonomia evoluo la kvantaj kaj kvalitaj postuloj pri akvo, ankaŭ pri protekto kontraŭ akvodamaĝoj. Aliflanke kreskas la polucio tiagrade, ke la malboniĝo de la akvokvalito grave damaĝas la medion, kaj malebligas laŭdezire utiligi la akvohavaĵojn. Samtempe la moderna socia-ekonomia strukturo reliefigas la disvolvon de la akvomastrumo kiel nepran premison de ĉia evoluo.

Ŝveliga baraĵo de la rivero Kőrös ĉe Békésszentandrás



La konsekvencoj de la taŭga akvomastruma disvolvo iel prezentas sin, kaj donas eblojn al aliaj infrastrukturaj programoj (utiligo de areoj, lokigo de loĝantoj kaj produktiloj, k.a.), ankaŭ al la disvolvo de aliaj ekonomiaj branĉoj.

La akvomastrumaj intervenoj etendiĝas jam al pli kaj pli vastaj teritorioj. Pro la tempa, teritoria kaj interbranĉa kompleksecо kaj pro la kreskantaj efikoj je la socio kaj ekonomio, tiuj intervenoj bezonas multflankan, antaŭvideman analizadon, kaj teknike, kaj ekonomie.

Por fiksi la disvolvajn celojn de la akvomastrumo oni devas do konsideri tiujn sociajn-ekonomiajn tendencojn kiuj:

a/ interrilatas kun la estontaj kvantaj kaj kvalitaj postuloj koncerne la akvomastrumon, kaj aliflanke

b/ influas al la cirkonstancoj, kiuj rilatas iamaniere kun la kontentigo de la bezonoj.

La akvomastrumo postulas grandegajn investojn, kies realigo daŭras longe. Necesas do profundaj ekzamenoj kaj korekta antaŭvido por trovi la disvolveblojn de la akvomastrumo, kaj fiksi ĝiajn teknikajn celojn en akordo kun la ekonomia kaj teknika progreso.

Eblas klare vidi, ke la akvobezonoj pli kaj pli determinas la disvolvon de la produktofortoj. En tio forte gravas la akcela disvolvo de tiuj branĉoj, kiuj konsumas multe da akvo (industrioj de kemiaĵoj, nutraĵoj kaj energio, agrikulturo, k.a.) kaj la kreskanta provizado al la loĝantaro, al la urboj kaj vilaĝoj. Pro la ekonomiaj transformiĝoj en Hungario, la industrio iĝis la plej granda konsumanto de akvo.

Sekve de la industriigo, urbanizado kaj agrikultura kemiizado, la akvohavaĵon ŝarĝas kreskanta kvanto da malpuraĵoj, malhelpante ĝian utiligon.

La Hungarlandaj riveroj, kiuj fluas de eksteraj landoj, jam tie grave polucigas. Vivnecesa tasko estas plibonigi la kvaliton de la akvoj kaj protekti ilian purecon. Tiucele oni devas apliki efikan teknikon kaj same efikajn ekonomiajn regulilojn.

Nuntempe la akvo jam ne apartenas al la libere uzeblaj naturtrezoroj. Pro la kreskanta konsumado kaj poluciado de la akvo la facile ekspluateblaj havajoj jam elĉerpiĝis. Pli malfacile iĝas akiri la akvon. Aldone, la akvohavajoj kaj la postuloj laŭ loko kaj tempo tre malegale prezentas sin. Transponti tiujn diversecojn eblas ofte nur per kompleksaj, grandajn teritoriojn koncernantaj hidrologiaj intervenoj. Tiuj tuŝas foje disajn interesojn de pluraj brancoj. Ekz. konstrui rezervajn establajojn por reguligi naturajn defluojn, rezervi akvohavajojn kaj laŭsisteme distribui, forkonduki akvon de akvoabunda regiono al mankhavaj regionoj, ekspluati akvon el profundo, apliki malpli da akvo bezonantajn teknologiojn ktp.

Se mankas akvo en iu regiono, tio povas kaŭzi – krom la loĝantaron premanta ĝeno – obstaklojn antaŭ la progreso de la koncerna regiono. Do la protekto de la akvohavajoj servas samtempe protekte al la cirkaŭajo.

Kreskas ĝenerale la kvanto de la organikaj kaj neorganikaj materialoj penetrantaj en la akvojn. Samtempe malpliiĝas la solvita oksigeno en la surteraj akvoj. Similaj malfavoraj efikoj trafas ankaŭ la subterajn akvohavajojn, kaj ties sekvoj ofte senteble ĝenas la akvomastrumon, kaj kvante kaj kvalite. Tutmonde montriĝas malboniĝo de la akvokvalito kiel mezurebla sekvo de la akcela disvolvo de la industrio kaj urbanizado. La akvoj bezonas do severan protektadon, antaŭvideme kaj konsekvence! La disponoj devas okazi ĝustatempe kaj laŭ tre zorge faritaj konsideroj, por eviti multekostajn, foje eĉ neniel reĝustigeblajn, grandiozajn damaĝojn.

Ekzistas akvocirkulado – kiel konate – en la naturo, kaj same en la homa medio. Iliaj interrilatoj ankaŭ interpuŝiĝas dum la evoluo, okazas kontraŭdiroj, kiujn la homa akvomastrumo devas solvi. La ĉefaj kontraŭdiroj estas la sekvaj:

– dum la rapide kaj daŭre kreskanta akvobezono, la natura akvohavajo – en relative granda teritorio kaj longa tempo restas – efektive konstanta;

– kreskas la distancoj inter la tempaj-lokaj alternadoj de akvohavajoj kaj de la pligrandiĝantaj bezonoj;

– ĝuste tie, kie plej granda estas la akvobezono, la polucio pleje kreskas, kune kun la civilizacia ŝarĝo sur la naturajn akvojn. La homaj intervenoj malfavore efikas al la naturmedio, al la biosfero. Tio ofte malfaciligas la naturan reprodukton de la akvo kaj ĝian reuzeblecon;

– mankoj montriĝas inter la financaj bezonoj de la akvomastrumaj taskoj kaj la fakte disponeblaj financoj. La ekspluato de la akvohavajoj bezonas konstante pli kaj pli altajn sumojn.

Balatona haveno ĉe Siófok

La materiaj kaj biologiaj specifoj de la akvocirkulado, ĝia ekologia rolo, la kreskantaj sociaj kaj teknikaj-ekonomiaj postuloj, la relative malgranda volumeno de la dolĉakvo, ankaŭ ĝia



En kloakakvo-purigilo (Peŝt-Nordo)

higiena graveco kaj la multflankaj minacoj al la akvoj – ĉiuj forte postulas, ke rilate la uzon, manipuladon kaj protekton de la akvohavaĵoj plene efektiviĝu la modernaj ekologiaj principoj. Interalie la sekvaj:

– la hidroteknikaj establaĵoj firmigu kaj ne bremsu la efikecon de la naturaj meĥanismoj, kiuj spontanee reagas kontraŭ la detrua forto de la akvo kaj helpas konservi la naturan kvaliton de la akvo;

– antaŭ ol decidi pri kunligo de riversistemoj, estas esplorendaj la ekologiaj sekvoj kaj la necesaj disponoj por forigi eventualajn damaĝojn;

– same estas anticipe esplorendaj el ekologiaj kaj hidrobiologiaj vidpunktoj ĉiuj ajn reguligoj aŭ kanalizadoj de riveroj, pluaj utiligoj kaj ŝarĝoj de naturaj akvoj;

– ju pli granda interveno okazas al la akvaj cirkonstancoj, des pli ampleksa kaj preciza ekologia ekzameno estas necesa antaŭ ekigo de la rekomendaj projektadoj, respektive dum la decidpreparo;

– ĉe konstruado de bordoj kaj fluejoj, la uzataj metodoj kaj rimedoj devas maksimume plifortigi la mempurigan kapablon de la akvo;

– ĉe lagoj, rezervujoj kaj fluoj oni devas establi ankaŭ biologian kontroladon de la akvokvalito. Per ĝi eblas ricevi tre fidindajn indikojn pri konsistaj kaj populaciaj ŝanĝoj de la akvaj vegetaĵoj, ankaŭ pri pezmetal-akumuliĝoj kaj ceteraj damaĝoj en la akvo, akva vegetaĵo kaj ŝlimo;

– por krei ekvilibron inter la akvohavaĵoj kaj bezonoj, oni devas prefere malpliigi la akvobezonon parte per akvo-reuzoj en la fabrikoj;

– estas grave levi teknike la efekton de la purigaj instalaĵoj, ankaŭ por ebligi ripetajn akvouzojn;

– baza postulo estas krei kompletan sistemon de juraj kaj ekonomiaj reguligoj – kaj ĝin konstante modernigi – por taŭge protekti la kvanton kaj kvaliton de la akvoj;

– por eviti en Hungarlando la „akvokrizon", oni devas en ĉiuj sferoj de la landa ekonomio fiksi inter la devigaj projektaj kaj esploraj taskoj ankaŭ la ekzamenadon de la akvobezonoj laŭ kvanto, kvalito, resp. por energetiko. Tio estu distingita tasko ĉe projektadoj koncerne la sociajn procezojn (demografio, sociologio, urbanizado k.a.) kaj la industrian disvolvon (inkluzivante ankaŭ la industriecan disvolvon de la agrikulturo). Dum nelonga tempo estas sciendaj la karakterizoj de la akvobezonoj laŭ kvanto, kvalito kaj direkto, almenaŭ ties limesoj, antaŭe kelkajn jardekojn. Nia regado super la akvo povas ja progresi nur laŭ la grado de niaj tiurilataj scioj;

– la ekzamenado de la komplikaj interligoj de homo, akvo, ekonomio kaj naturmedio forte bezonas vastigi apud la teknikaj, biologiaj, juraj esploroj ankaŭ la hidroekonomiajn esplorojn. De tiuj estas postuleble, ke pere de la modernaj metodoj de ekonomio, ekonomia matematiko, sistemteorio kaj aliaj sciencoj, inter aliaj problemoj ankaŭ la praktika mastrumado pri la akvohavaĵoj ricevu efikan sciencan subtenon;

– pro interesiĝo de la plur- kaj interbranĉaj esploroj pri la akvoprotekto, ampleksiĝas ankaŭ la interrilatoj de la esploristoj, kies agadoj pli kunordiĝas;

– laŭeble baldaŭ estu ĝenerale uzataj akvoŝparaj kaj protektaj teknologioj.

La efikoj de la antaŭvidebla socia-ekonomia disvolvo al la akvomastrumo

La vivnecesa akvo troviĝas en la naturo nur en limigita kvanto, eĉ malegale en tempo kaj spaco. Ĝia manko,

Nova bordoŝirmilo de Tiso ĉe Szeged



eĉ ankaŭ ĝia ekzisto povas kaŭzi damaĝojn. Estas la tasko de la akvomastrumo alĝustigi la naturajn cirkonstancojn al la bezonoj de la socia-ekonomia disvolvo. Kompreneble tiun alĝustigon kaj la kontentigon de la sociaj bezonoj oni devas efektivigi kiel eble malmultekoste.

La kontentigo de la bezonoj efektiviĝas pere de teknikaj intervenoj kaj grandaj instalaĵoj. Sekve fariĝas grava celo ĉe la instalaĵo en ĉiu funkcia periodo, ke ĉiu unuo de la kontentigo (ekz. de akvobezono) kostu plej malmulte. Tio faras necese ĝuste determini la intervenon, la kapaciton de la instalaĵoj kaj la tempon de ilia ekfunkciigo.

La grava signifo de la prognozoj montriĝas precipe ĉe la anticipa indiko de la bezonoj. Nome, la sufiĉe precizaj prognozoj grave helpas determini la necesan kapaciton kaj la plej favoran ekfunkciigan daton de la investaĵoj. Ilia utiligo, ankaŭ la specifaj kostoj tiamaniere iĝos la plejeble favoraj dum la tuta ekzisto, ĝis la plena eluziĝo. Kaj tio estas ege grava, ĉar la nombro de la akvomastrumaj establaĵoj pli kaj pli kreskas. Tio estas tuj pli klara, se oni pensas pri la ade kreskantaj akvopostuloj pro la akcela disvolvo de la lando, aliflanke pri la bezonata plia sekureco kontraŭ akvodamaĝoj kaj difektoj de akvokvalito.

En Hungarlando daŭre intensiĝas la industria produktado, ankaŭ ties strukturo ŝanĝiĝas. La intensiĝo estos pli forta koncerne la elektroenergioproduktadon, pezan kemiindustrion, kaj nutraĵindustrion, kaj tio levos la akvobezonojn eĉ malgraŭ disvastiĝo de akvoŝparaj teknologioj.

La agrokultura produkto kreskas ĉiujare je 2-3 procentoj, dume ĝia teritorio malpliiĝas. Tio necesigas plivastigi la irigacion – kiu sekurigas la produkton – kunligante tion kun riverordigo. La industrieca bredado forte modifas la akvouzon de la agrikulturo, kaj multloke postulas pliajn kvantojn. Aparte prezentiĝas ankaŭ taskoj por konvene manipuli kaj lokigi la kloakakvon de la grandaj bredejoj, krome por likvidi la poluciiĝon pro sterkaĵoj kaj kemiaj sarkiloj.

Paralele kun la ekonomia progreso kreskas la bezonoj pri „infrastruktura" provizado. La intensa urbanizado, vilaĝa modernigo kaj loĝejkonstruado nepre bezonas kondukitan akvon kaj kanalizadon. Multloke en la pasinto tio mankis. Oni devas laŭgrade likvidi ankaŭ la provizoran postreston de kanalizado kompare al la akvoprovizo. La vilaĝoj ankaŭ tiurilate proksimiĝas al la urba kutima prizorgo.

La Hungarlandan akvohavaĵon plejparte surteraj akvoj konsistigas, kies 90 procentoj troviĝas en la grandaj riveroj. Ilia akvo devenas preskaŭ tute el aliaj landoj – fakto tre atentinda kiam oni kalkulas pri la estontaj bezonoj. Apud Danubo kaj Dravo troviĝas ankoraŭ relativa abundo de akvo. Sed en la valo de Tiso la natura distribuo de akvo jam ne kovras la bezonon, ĝin plibonigas kanalaro kondukata de Tiso. Por kontentigi la bezonojn malproksime de la riveroj, akcele devos realiĝi la regionaj akvon produktaj–distribuaj sistemoj, rezervujoj kaj alfluigaj instalaĵoj. Restas farendoj ankaŭ en internacia rilato, ĉar estas akirendaj taŭgaj proporcioj en la divido de la akvohavaĵoj kaj en la reciproka protekto de la akvokvalito.

Dum la venontaj periodoj la teknikan disvolvon karakterizas tiuj ĉefaj tendencoj:

– Por reguligi la defluon de la akvoj oni devas strebi al optimuma akvo-bilanco inter la diversaj bezonoj. Tiucele unuavice estas akcele forfluigendaj la neuzeblaj nocaj akvoj, aliflanke retenendaj la utiligeblaj akvohavaĵoj. Por plivastigi la lokajn eblojn, necesas krei serion da rezervujoj ĉe la opaj fluoj.

– Estas akcele adaptindaj la rezultoj de la teknika progreso, inter ili la aŭtomatizado, la maŝinizado de konstruado, la plastoj k.a.

– Oni devas inventi pli da akvoŝparaj teknologioj kaj levi la efikecon de purigiloj, tiel per ripeta uzo malpliigi la akvobezonon.

– La perspektivajn disvolvojn necesas subteni per firmigo de taŭga kaj kunordigita industria fono. Pligraviĝas la tipizado kaj la sistema kunlaboro ĉe konstruado kaj muntado.

La nuntempaj agantoj de la akvomastrumo kun plena zorgemo – samkiel iliaj antaŭuloj – intervenas en la vivon de la akvoj, ĉiam kun atenta konsidero observante la multflankajn efikojn kaj en la naturo, kaj ĉe la socio. Ĝuste tial eblas atendi bonajn rezultojn

Inundon observas aeroplano de la Hidrologia Servo

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

Mono en la kelo

Antonio Borza ne ŝatis labori. Li subluis ĉambron, sed ofte, kiam li ne havis monon, sen adiaŭo li sekrete forlasis la nepagitan restejon. Estante senmone, li vole-nevole akceptis simplan laborpostenon. Tie li fervore kaj servoprete laboris, ofte ridetis kaj sukcesis akiri fidon de la homoj. Sed post nelonga tempo li jam tediĝis, kaj serĉis alian okupon. Por tia vivmaniero li zorge gardis du kofrojn: la unua enhavis elegantan vestaĵon, en la alia troviĝis simpla laborkostumo, kaj tiamaniere li facile translokiĝis al alia luita ĉambro.

Iutage li promenis tra parko, kie bela blondulino sidis sur benko, manipulante modernan fotoaparaton. Li sidiĝis apud ŝi.

– Ĉu vi estas fotografistino? – li demandis baldaŭ.

– Samkiel vi estas la urba episkopo! – impertinentis ŝi.

– Kie vi laboras do?

– Nuntempe nenie... mankas al ĝi la emo...

Antonio komprenis, ke la fraŭlino vivas kun la samaj principoj kiel li. Baldaŭ ili interparolis pri facile akireblaj monoj, pri serena, senzorga vivo, pri belaj aŭtoj... la simpatio kreskis inter ili. Fine Antonio demandis:

– Kie vi loĝas?

– Nur sola, en mia propra dometo... bedaŭrinde ĉe la rando de la urbo.

– Ĉu vi donos tie lokon ankaŭ por mi?

– Sed mi ankoraŭ ne konas vin...

Tiel komenciĝis ilia kunvivado. Iufoje Antonio laboris, alifoje Klotilda. La najbaroj ekkonis ilin kiel sufiĉe elegantajn, ĉiam ĝentilajn, kiel laŭdindan paron. Kaj tiun ĉi bonan ŝajnon ili devis firmigi, ĉar dum la longaj, intimaj noktoj ili jam elpensis grandan planon.

Por realigi tiun planon, ili veturis al fora urbo. Antonio kunportis elegantan aktujon, Klotilda la fotoaparaton kun lumigilo. Ŝi nun ne estis blonda, ĉar peruko igis ŝin longhara kaj nigra... Antaŭ deketaĝa betondomego de nova loĝkvartalo Klotilda sidiĝis sur benko, dum Antonio iris en la domegon. Ĉe la unua loĝejo li tiel komencis paroli:

– Estimata sinjorino, espereble mi ne venis en malkonvena horo... mi estas agento de fotografisto. Mi eksciis, ke vi havas belegajn infanojn...

– Dankon, mi havas jam fotojn sufiĉe...

– Jes! Certe amatorajn fotojn! Sed havante tiel belan loĝejon, vi devas ornamenti ĝin per altvaloraj bildoj!

– Mia edzo nur posttagmeze venos hejmen...

– Bonege! Nia fotografistino tiutempe alvenos! Bonvolu subskribi la mendon, jes, ties kopio estas ankaŭ la kvitanco pri via antaŭpago. La duan partopagon bonvolu transdoni al la fotografistino, kaj post dek tagoj ni alportos la fotojn, bonvolu nur tiam pagi la restantan sumon! Se la bildoj ne plaĉos al vi, tiam ni faros senpage novajn – vortgalopis konvinke Antonio.

– Mi tute ne scias kion mi faru... – prenis la plumon la sinjorino.

– Ege mi dankas, tre estimata sinjorino.

Tiel fluis la frazoj el la buŝo de Antonio, ĉiam laŭ la situacio. Kiam li finiris la domegon, li donis la liston al Klotilda, kiu ekiris fotografi – sen filmo. Diligente laboris la ĉarma paro, sen ia embaraso aŭ ĝeno. La bona ŝajno, aplomba konduto kaj flatkaresa teksto estis sufiĉaj. Oni petis nek legitimilon, nek magistratan permeson, ja la homoj estas ege kredemaj.

La aktujo de Antonio iĝis plena de mono. Tamen, hejmenveninte ili tuj komencis labori ĉe la proksima ĝardenisto por havi alibion pri konstanta okupo.

Pasis la tagoj. La mendintoj jam maltrankviliĝis, ĉar ne alvenis eĉ unu bildo. Post la plendoj la polico konstatis, ke la stampoj sur la kvitancoj estas falsaj, tiunoma fotografisto nenie ekzistas. La polico serĉis ĉie la longharan nigrulinon kaj la blondan viron, sed vane. En alia landparto la afero post monato ripetiĝis, poste ankaŭ en pluraj urboj, en aliaj maskoj kaj kun aliaj stampoj. Oni eldonis tutlandan polican priserĉan mandaton, tial en multaj ripozlokoj policistoj vane kontrolis la dokumentojn de senkulpaj, veraj fotografistoj. Eble tiam Antonio trankvile plantis sur areo de la ĝardenisto...

La mono daŭre plimultiĝis. Ili ŝlosis ĝin en feran keston, kiu estis bone kaŝita en kelo de la dometo.

Dum unu jaro nenio aŭdiĝis pri ili, tial la dosiero pri la ĉarlatanaj fotografistoj estis jam metita en arkivon. La paro aĉetis uzitan aŭton, kaj kiam plaĉis al ili, dum ferioj ili ekskursis kaj vagadis tra la tuta lando. La bonaj najbaroj menciis ofte, kiel diligentaj ili estas, tute ne similaj al la nuna junularo...

Post iom da tempo venis informoj pri juna paro al la polica centro, kiu per aŭto vizitas etajn vilaĝojn, montras modo-revuojn kaj kolekton da ŝtofoj kaj akceptas mendojn pri vestokudrado. La virino mezuras, la viro prenas antaŭpagon – duonon de la prezo – kaj poste ili ambaŭ forvaporiĝas.

La policanoj ĉie persekutis la ĉarlatanojn, sed sensukcese. Oni ja diras, ke muso estas pli lerta ol kato – aŭ ne? Fine la polico en la televida polica serĉprogramo „Blua lumo" montris diversajn imagitajn figurojn pri la paro, kaj petis helpon de la publiko.

* * *

Kara Leganto! Mankas la fino de tiu historio, pri la senmaskigo de la ler-

taj krimuloj. La redakcio petas vian helpon: finu la historion. La sendinto de la plej bona solvo – ĝi ne estu pli longa ol 30-35 tajpitaj linioj – ricevos libropremion kaj la teksto aperos en H.V.

Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi numero.

Daŭrigo de la novelo „Altirforto de la mono"

aperinta en la n-ro 1981/5. Ĝia aŭtoro: Ákos Horváth (Budapeŝto) ricevis la libropremion.

... Ekstraktoj el skriba raporto de la esplorinta policoficiro: „Raporto, al Estro de la Budapeŝta Polico.

Mi raportas, ke laŭ via ordono mi esploris la aferon, anoncitan de la Direkcio de Trajnpoŝto, pro manko de monsaketo kun 100 mil forintoj..."

„... estis konstatite, ke okaze de la malapero de la menciita monsaketo, en la koncerna trajnpoŝto deĵoris: Stefan K. poŝtoficiro, kiel rubrikisto, respondeca estro de la poŝtvagono, Georgo L. leterdistribuanto, kaj Jozefo M. pakaĵmanipulanto.

Dum la enketo estis konstatite, ke antaŭ unu monato en la sama itinero – al Budapeŝto veturante – ili deĵorfine denombris kun manko, kiu sume estis 10 mil forintoj. La tiama poŝta enketo – manke de pruvaĵoj – absolvis ilin. Tiun ĉi enketon gvidis poŝtinspektoro Maks Zabos.

La nuna polica enketo konstatis, ke tiuj ĉi poŝtistoj regule kaj ripete drinkis dumvoje, ankaŭ dum hejmenveturo. Georgo L. havas feriodometon kun ĝardeno en vilaĝo Tarkas, tuj apud la fervoja linio, sur kiu lia trajnpoŝto regule trafikas..."

„... Evidentiĝis, ke Georgo L. prenis la monsaketon de antaŭ Stefan K., kiu duonebrie sidis ĉe sia tablo, malgraŭ la poŝtaj reguloj rilatantaj al la manipulado kaj gardado de valoraĵoj. Antaŭ ol Stefan K. rimarkis la mankon de la saketo, Georgo L. jam nerimarkite elĵetis ĝin el la vagono al direkto de sia ĝardeno. La ĵeto malsukcesis, la serĉantaj policanoj trovis la saketon proksime al lia ĝardeno. Georgo L. finfine detale konfesis pri sia kulpo, ankaŭ rilate la ŝtelon de la 10 mil forintoj..."

La policoficira raporto fine proponis, krom la kriminala proceso kontraŭ la trajnpoŝtistoj, oficiale rekomendi al la Budapeŝta Poŝtodirekcio prijuĝi la suprajan esploradon de Maks Zabos kaj konvene puni lin, aliflanke pli regule kontroligi la trajnpoŝtojn.

Daŭrigo de la novelo „Ciutaga historio"

aperinta en la n-ro 1982/1. Alsendis ĝin Wojciech Jacek Usakiewicz el Varsovio, kiu ricevis la libropremion.

Redaktoro Vere Bonul faris grimacon pro enuo, ĉifis siajn plenskribitajn foliojn kaj ĵetis ilin en paperkorbon. Li prenis desur la tablo la florojn, aĉetitajn por la edzino, kaj forlasis la redaktejon. Dum hejmeniro li kolere pensis pri sia skribaĵo... *Ĉiutaga historio...* jen, jen, nur tion li kapablis elpensi! Ĉu valoras perdi tempon por sentalente rakonti tiajn banalaĵojn, ege enuigajn... Plenas la vivo de tiel enuigaj, grizaj tagoj, grizaj hometoj, ej, ej...

Subite, dum tiaj meditadoj ne atentante, li stumblis sur ia glitaĵo, kaj falis, ĝuste en mezon de surtrotuara flako. Lia vesto griza iĝis tuj multloke punktita per nigraĵoj.

– Diablon! – li blasfemis, kaj denove, kiam li rimarkis, ke la rozaj diantoj iom suferis pro la falo. Baldaŭ Vere Bonul hejmenvenis. El la kuirejo saltetis svelta, blondhara virino.

– Karega Eva, saluton! – diris moltone la redaktoro, kaj kisis la frunton de la edzino, transdonante al ŝi la difektitajn diantojn. – Tuj Vi surpriziĝos! Imagu! mi ricevis komision de la gazeto: mi devos forveturi al Londono por tuta semajno...

Teatra Festivalo ripertiĝos!

La Esperanta gazetaro tre amplekse kaj favore raportis pri la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, okazinta fine de marto en Budapeŝto, enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo. Kun ĝojo ni publikigas la agrablan novaĵon: ankaŭ en 1983, inter la 18-a kaj 27-a de marto la Renkontiĝo ripetiĝos.

En la programo oni antaŭvidas almenaŭ dek teatrajn prezentadojn dum dek tagoj. Gastrolos polaj kaj bulgaraj geaktoroj, sed la kernon de la programo kontribuos hungaraj trupoj profesiaj. Jen, la prezentotaj teatraĵoj (laŭ la provizora programo):

E.L. Masters: La mortintoj de Spoon-River
S. Beckett: La lasta magnetofonbendo de Krapp
B. Choinski: Malfermu la pordon!
A. Cwojdzinski: Hipnoto
Strindberg: Makabra danco
Monodramo pri la vivo de Sándor Petőfi
Muzika-literatura solprogramo de la hungara aktorino, Ildikó Pécsi
Á. Kertész: Kiu riskas, tiu gajnas
J. Elem: Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?
Parada revua programo de hungaraj, bulgaraj kaj polaj geaktoroj

La organizantoj kaj la kontribuantaj aktoroj esperas, ke troviĝos ne malmultaj esperantistoj en landoj proksimaj al Hungario, kiuj deziros nepre ĉeesti tiun ĉi unikan programon. En la nuna momento – kiam tiu ĉi artikolo iras en la presejon – mankas ankoraŭ precizaj informoj pri la turisma aspekto de la aranĝo, sed kiam Vi legos tiujn ĉi liniojn, la Turisma Komisiono de HEA jam havos multobligitan informilon kun ĉiuj detaloj pri la partopreneblo. Ne hezitu do tuj peti tian informilon ĉe Hungara Esperanto-Asocio (ĉe s-ino Margit Evva), H–1368 Budapest, Pf. 193.

GAJA PAĜO

Teksto en Teksaso

Gono eniras drinkejon, alpaŝas la ĉefon kaj petas viskion. Ĝin eltrinkinte li fiksrigardas la apude sidantan viron, kaj demandas lin:

– Vi ŝajnas tre bone konata al mi! Ĉu ni ne interpafadis iam?

Teksto pri drinkejo

– Terure kiel mi vivas! Mia edzino ĉiuvespere vizitas drinkejon.

– Kial vi ne eksedziĝas?

– Neeble. Kiu akompanus min tiam hejmen?

Jubilea bankedo

Post 25 jaroj la iamaj gimnazianoj kunvenis por festeni, kaj paroli pri tempoj pasintaj. Iu el ili demandis samklasanon:

– Ĉu vi amas ankoraŭ hodiaŭ vian edzinon?

– Ne, hodiaŭ jam ne, tiel malfrue ŝi kutime jam dormas.

En tiu ĉi klaso okazis iam

– Kio pruvas, ke la Tero estas globforma? – demandis profesoro.

– Oni devas nur alrigardi la globuson sur la tablo.

Mi aŭdis en kafejo

ke la virinoj vestas sin per pantalono por pli simili al la viroj. Sed ili surprenas ankaŭ diafanan bluzon por demonstri ke ili ne estas tiuj.

Aŭdiĝis de najbara tablo

– Rikardo, rigardu al la angulo, tie sidas mia edzo kun virino! Terure! Ĝuste kiam mi estas vizitanta mian malsanan panjon!

... kaj el la direkto de alia tablo

– Amikino kara, mia bonŝanco estas vere ne ĉiutaga! Sonĝe – eble sub pomarbo – mi edziniĝis al bela fraŭlo. Feliĉe, matene mi vekiĝis, je mia ega ĝojo... ĉar la geedzeco ĝis tiam jam fiaskis!

La artisto de la librobindado

Iama verkisto, Albert *Szenci Molnár,* ankaŭ fama libroamanto, skribis: *La homo naskiĝas ne nur por si mem,* kaj tio estas la devizo ankaŭ de la renoma majstro de librobindado, György *Váci.* Liaj verkoj bone pruvas, ke praktikante tiun branĉon oni povas iĝi vera artisto de libroj, evoluigante la librobindadon ĝis arta grado. Iam, estinta eble nur kvin-jara, lin ravis bela libro de fabeloj – kaj la belaj volumoj kaptas lian spiriton ankoraŭ nun en la urbo de belaj bibliotekoj, en *Vác,* kie li vivas kaj laboras de sia 15a jaraĝo.

György Váci daŭre kreas pli kaj pli belaspektajn librojn, ofte renovigas majstre ankaŭ unuopajn volumojn laŭ mendoj el multaj landoj. Liaj produktaĵoj plezurigas la homojn dise en la mondo, de Anglio ĝis Japanio, ili alvenigas pluajn komisiojn al la majstro.

En la lastaj jaroj kreskis la intereso de la publiko pri la miniaturaj libroj. Tio donis la ideon al Váci, krei libroforman „ujon" por la plej etaj libroj: li sukcesis, kaj tiu unikaĵo iĝis aparte ŝatata de la libroamantoj. Cetere, ori kaj ornami la „krudajn" kovrilojn de tiuj libretoj estas kvazaŭ pasio de majstro Váci, pri kio li diras: „Penige malfacila estas tiu laboro, ĉar ĝi postulas specialan zorgemon jam dum la projektado de la kovrilo. Mi uzas prefere ledon, ankaŭ artefaritan, kies koloron mi devas zorge elekti. Laŭ mi tiucele pleje taŭgas la blanka koloro kombinata kun oro, se la enhavo de la libro permesas tion, eventuale la deziro de la mendintoj. Oni ofte postulas de mi altan nivelon, tamen al mi donas plezuron eĉ ŝajne simpla kaj modesta deziro."

György Váci, nun 63-jara, konas jam la grandan sekreton de la artoj. Tiu sekreto brilas videble desur la volumoj, kiujn li prilaboris per manaj iloj, presilo kaj fajro. „Nur de fajro iĝos brilaj la librokovriloj" – asertas konvinke Váci.

Vere, la plejan belecon de la bindaĵoj alportas la surbruligitaj ornamaĵoj, ties *subtila* prilaboro. Jes, la subtileco, emfazas Váci, pli ol la delikateco (kvankam ambaŭ sencoj estas proksimaj), ĉar la subtileco karakterizas majstron, dum delikateco aludas al la artista spirito. La distingo montras la du personojn en lia memo: la majstron kaj la artiston. La fakscio enestas en liaj lertaj manoj, kaj la artaj konceptoj en lia animo.

Estas inde mencii ankaŭ alian flankon de la majstro: lian intencon, heredigi sian tutan havaĵon al urbo Vác por instali *hejmon* de aĝuloj kaj *muzeon* de belaj libroj... Laŭ lia devizo: ... ne nur por si mem!

Lajos *Kapitány*



recenzoj * recenzoj

Bildromano ŝoka kaj pensiga

Nakazawa Keizi: Nudpieda Gen. Bildromano. Tradukis: Izumi Yukio. Eldonis: Rondo Gen, Tokio, 1982. 284 p. 24 cm.

„Sincere aspirante pacon bazitan sur justo kaj ordo, la japana popolo rezignas por ĉiam militon... por solvi internacian konflikton. Por atingi la celon de ĉi-antaŭa paragrafo, nenia ter-, mar-, nek aer-armeo, nek alia militivo estos posedata. La militrajto de la ŝtato ne estos agnoskita. – Artikolo 9 de la Konstitucio de Japanio."

Tiu ĉi citaĵo estas la moto de la ampleksa bildromano, kiu per la sorto de unu familio prezentas al ni la sorton de japanoj dum la dua mondmilito, kaj ankaŭ la teruran bombon, kiu aĉe finis aĉe komencitan militon.

Gen estas juna knabo, vivanta en Hiroŝimo. Lia patro, Dakaiti ne kredas la mensogan militistan propagandon kaj kontraŭas la militon, ĉar li konkludas, ke la terura mizero, en kiu li vivas kun la familio, estas konsekvenco ĝuste de tiu milito. Oni enkarcerigas lin, sed lia familio suferas ankaŭ post lia liberiĝo: la stultigaj homoj nomas ĝin perfidula familio. Por silentigi la akuzantojn, unu el la filoj, Kôzi iras militservi. Kaj alvenas LA TAGO: la 6-a de aŭgusto 1945. Gen vidas morti sian patron kaj siajn gefratojn Sinzi kaj Eiko. Kaj en la sama tago li mem asistas ĉe la naskiĝo de sia fratino Tomoko. En la apokalipsa brulo li levas alten la novnaskitan fratineton kaj diras al ŝi: „Memoru tion, Tomoko! Tio deprenis de ni vian patron, fraton kaj fratinon. Tio estas milito. Kiam vi plenkreskos, NENIAM lasu okazi militon, neniam denove."

Animskuaj vortoj, kies valoron multe fortigas la fakto, ke Nakazawa kondamnas ne nur tiujn, kiuj ĵetis la bombon, sed ankaŭ tiujn, kiuj per mensoga milita propagando frenezigis la tutan japanan popolon, kapabligis virinojn mortigi la proprajn infanojn ol kaptiĝi de la britaj kaj usonaj „diabloj". Volonte mi renkontis tian starpunkton, ĉar nur antaŭ kelkaj tagoj mi vidis japanan televidan filmon („Ribelo de maljunuloj"), en kiu pozitiva

protagonisto iom nostalgie memoras la rezistemon kaj decidiĝentecon de japanoj dum la dua mondmilito. Espereble tiuj virtoj – ebligintaj stultigon de tuta popolo – ne regajnos la iaman aŭreolon...

Nudpieda Gen estas samtempe ŝoka kaj pensiga legaĵo. La ĉ. 2000 desegnaĵoj surhavas la karakterizajn trajtojn de la japana grafikarto, tamen ili ne estas aparte „japaneskaj".

Gratulon pro tiu ĉi bela libro al la Rondo Gen, inter kies membroj volonte mi renkontas la nomojn de deko da personaj geamikoj.

V. *Benczik*

Por interkompreniĝo kultura

Miyamoto Masao: Skiza historio de Utao. Eldonis: La Kritikanto (Takasago, Japanio), 1979. 85 p. 21 cm.

Eŭropaj esperantistoj jam delonge havas pli klarajn konceptojn pri japanaj versformoj ol ordinara poeziamanto en iu ajn lando ekster Azio, tamen, iliaj konkretaj scioj plej ofte estas nur nebulaj kaj proksimumaj.

La du ĉefaj karakterizaj japanaj poemoj por eŭropanoj nepre ŝajnas *hajko* kaj *utao*. Pri tiu ĉi lasta informas la legantojn Miyamoto, kiu faris ĝis nun multege por la internacilingva popularigo de la japana kulturo.

Utao estas kvinversa mallonga poemo, kies versoj konsistas el 5-7-5-7-7 versoj; en la t.n. longutao en laŭplaĉa kvanto alternas versparoj 5-7 silabaj, kaj la tuto fermiĝas per 7-silaba verso. En la Esperantaj tradukoj la dua kaj kvina versoj de la utao kunrimas.

Laŭ la legendo „la utao originas de Princino Sitateru vivanta en la ĉielo kaj Princo Susanoo vivanta sur la tero, malgraŭ ke iliaj utaoj ne havas tian formon, kiel la nuna." Ĉiukaze, utao estas ĝenro antikva, kiu, laŭ Miyamoto, en Japanio jam estas rigardata kiel amatoraĵo, tamen, antaŭ nur kelkaj jardekoj verkiĝis utaoj, kiuj apartenis al la kremo de la japana poezio, ekz. tiuj de Takuboku, aperintaj ankaŭ libroforme en Esperanto. Miyamoto obsede trakondukas la senscian leganton tra la utaaro de pli ol jarmilo, tiel, ke oni spertiĝas pri la historio de la utao ĝuante altkvalitan poezion. Ĉe la fino aperas interesa apendico: cent utaoj de cent utaistoj.

La libro de Miyamoto certe grave kontribuos al la reciproka kompreniĝo kultura inter japanoj kaj eŭropanoj – almenaŭ en la kadro de la Esperantomovado.

V. *Benczik*



Kulturklerigaj kajeroj

Agostinho da Silva: La vojaĝoj de Kolumbo – La lernejoj de Winnetka. Tradukis Manuel de Freitas, resp. José de Freitas. La serion eldonis: Portugala Eldona Rondo, Porto, Anselmo Braancamp 259. 1982. Mimeografite, 24 p. 20 cm. Prezo de kajeroj: po 2 rpk.

La eldona iniciato ŝajnas interesa por multaj legantoj, kaj oni povas nur bedaŭri, ke la malvasta amplekso de la kajeroj iom limigas la aŭtoron. Sekve la reduktita teksto ofte ne estas en konvena ekvilibro. Verŝajne pro manko de spaco ekrapidas la lasta triono en la kajero pri Kolumbo, kaj iĝas tro densa, kvankam la antaŭa parto ankoraŭ fluis plezure, ankaŭ kun la necesaj detaloj. Prave, la aŭtoro sen ŝovinismo malakceptas la supozon, ke Kolumbo naskiĝis en Portugalio, same prave li sukcesis atentokapte, eĉ foje ekscite rakonti la luktoplenan vivon de la granda malkovrinto.

Apud Ĉikago en urbo Winnetka oni komencis post la 1a Mondmilito reformpedagogian instruadon. Pri tiu – multe diskutata – sistemo ni legas plurajn ekzemplojn, diversajn manierojn, certe ne la plej modernajn (nek Freinet, nek aliaj novaj metodoj estas menciataj!), ŝajne la verketo devenas el la tridekaj jaroj. Ambaŭ tradukoj, preskaŭ senriproĉe, legiĝas agrable kaj facile kompreneble.

Szilárd *Bálint*

Agostinho da Silva: Vivo de Edison. – La stoikismo – La petrolo – Vivo de Pierre Curie. Kajeroj el la sama serio, laŭ la supraj indikoj.

Tiuj historiaj kajeroj, ĝuste pro siaj etaj ampleksoj, kvazaŭ sin proponas por ankoraŭfoje, eble kure legi plimalpli konatajn, sed iel gravajn eventojn de bio- kaj monografioj. La leganto ne devas seniluziiĝi, ĉar agrable, preskaŭ distre oni ricevas kion oni atendis: refreŝigindajn aŭ novajn, sed interesajn informojn. Racia kaj humana estas la komentaria tono de la aŭtoro, spirite freŝa, stile sufiĉe elokventa por teni la atenton – kaj kio pli gravus dum kleriga klopodo? La aŭtoro pledas por la ĉiurilata progreso, trovas vipajn vortojn por la profitemaj kaj bremsaj agadoj de instancoj kaj monopoloj. Domaĝe, la kariero de petrolo en la kajero surprize ĉesas *antaŭ* la Hitlera agreso – videble ĝi estis *tiam* verkita, sed kial Esperanten tradukita post preskaŭ duonjarcento? Ambaŭ sinjoroj Freitas produktis taŭgajn, bonstilajn tekstojn.

Ervin *Fenyvesi*

Manlibro pri sciencistoj

Christian Darbellay: Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko, 1981. Eldonis la Kompilinto (Jostenalle 45, D-4040 Neuss 1, FR Germanio) 275 p. 21 cm.

Informoj estas la plej grandaj valorajoj en la nuna mondo, kaj precipe en la

30 1952 1982

LEHEL

Gusto, koloro konservigas en la fridujo

LEHEL

scienca vivo. Oni elspezas ĉiujare centojn da milionoj da dolaroj por perfektigi la informajn kanalojn inter scienculoj, ja ĝustatempa kaj preciza informo pri la esplorkampoj de kolego foje-foje povas rezultigi ŝparon de konsiderindaj sumo kaj tempo.

Ebloj de kontakto inter scienculoj uzantaj Esperanton estas aparte grava por ni, ja tiuj ebloj povas kontribui al signifa vastigo de la uzado de la Internacia Lingvo.

Darbellay faris do eksterordinare gravan laboron: li aperigas kolektitajn detalajn informojn pri 200 personoj – grandparte veraj scienculoj – kiuj uzas Esperanton por sciencaj celoj. La aperantaj riĉaj informoj pri fako, esplorkampo, regataj lingvoj, publikaĵoj ktp. prezentas sufiĉan bazon por estiĝo de viglaj sciencaj kontaktoj inter la prezentitaj personoj (kies foto ankaŭ presiĝas, kvazaŭ por „vivigi" la eble tro sekan informaron.) La unupaĝajn prezentojn bele kompletigas laŭfaka kaj laŭlanda indeksoj, kaj tiel la libro vere fariĝas ideale manipulebla.

Cetere, ne nur 200 personoj en la mondo uzas Esperanton por sciencaj celoj; Darbellay havas sliparon pri 1442 homoj el 52 landoj, tamen, kun indikoj malkompletaj. Apendice aperas ankaŭ laŭfaka listigo de tiuj 1442 nomoj, kiujn tamen necesus revizii, ĉar aperas tie ekz. la nomo de la hungara lingvisto G.Bárczi, mortinta antaŭ pluraj jaroj.

Tiu ĉi libro, kompreneble, ne nepre devas troviĝi en la biblioteko de ĉiu esperantisto. Sed jes ja, ĉiu esperantisto devas agi por tio, ke ĝi troviĝu en la biblioteko de ĉiu scienca instituto, esplorcentro, Akademio. Ĉu persvadante la koncernan bibliotekon aĉeti ĝin, ĉu mem aĉeti kaj donaci ĝin al la koncerna biblioteko.

V. *Benczik*

Krimo kaj humuro en la 17a jarcento

Lorjak: Regulus. Romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Plejado (Eldono Gabrielli). Beletra eldon-serio n-ro 16, Ascoli Piceno (Italio), 1981. 339 p. 21 cm.

La aŭtoro ne bezonas prezenton: ĝis nun li aperigis tri originalajn romanojn – Neologisme (1975), Transe (1976), Retoj (1978) – kiuj ĉiuj tri trovis tre favoran akcepton ĉe la publiko, kvan-



kam mi devas diri, ke el ili mi ĝuis vere nur la petole spritan *Neologisme: Transe* ŝajnis por mi iom tre senbrida kaj absurda, *Retoj* ŝablona kaj naiva. Nun mi havas tre agrablan situacion recenzante *Regulus:* ĝi estas nepre la plej bona romano de Lorjak, kaj verŝajne ankaŭ la plej elstara produkto de nia poramuza prozo dum la lasta tempo.

Mi skribis „poramuza prozo", kaj tion oni ne komprenu subtakse. Distri la leganton ĉiam estis unu el la ĉefaj celoj de ĉia literaturo, kaj Lorjak plenumas tion evitante ĉian primitivecon, grizecon, ŝablonecon, tiel oftajn en la nuntempaj distraj romanoj. En *Regulus* fajreras aro da spritaj, originalaj ideoj, kiujn li neniam ekstremigas aŭ tro multe eluzas, sed utiligas ilin kun bontakta gusto, kiun la internacia publiko emas rigardi specifaĵo de la franca spirito.

Mem la startiga ideo estas elegante originala: tipe nuntempan krimon li transplantas al la 17-a jarcento, kaj disvolvas la intrigon tre lerte, laŭ la reguloj de bona detektiva romano, sed samtempe regalante la legantojn ankaŭ per aŭtentika historia etoso kaj elokventa franca humuro. Jen, kiel la romano ekas: mistera bando verŝajne protektata de tre altrangaj personoj, certa U.F.E. (Unuiĝo de la Fuŝist-Ekstermantoj, do ne temas pri Unuiĝo Franca por Esperanto) rabas la Parizan skabenon Regulus Galvin, kaj postulas de la urbo ostaĝmonon de 400 mil pundoj. Kiel kutime, polico impotentas, kaj baldaŭ aperas sur la scenejo ankaŭ alia bando, S.A.T. (Senkompata-Akraglava-Tribunalo), kaj la situacio ĉiam pli komplikiĝas... Fine tamen ĉio klariĝas, sed la pli ol tricent paĝoj ne servas nur malimpliki la krimmisteron. De tempo al tempo la historion spicas interesaj epizodoj (ĉiam koheraj partoj de la tuto!), kiuj ne lasas la leganton troe mergiĝi en la kriminologiajn logikaĵojn, sed invitas lin atenti pri aspektoj pli leĝeraj, ekzemple, kio okazas, se deksesjara juna aristokrato kaj tridekkelkjara markizino kune malaperas...

En tiu ĉi romano Lorjak prezentas al ni interesan historion, tre bone konstruitajn strecajn situaciojn kaj ŝatinde individuajn figurojn, laŭ la ĝenerala koncepto aŭtentike francajn. Kio plia necesas? Nu, bona stilo. Tio ankaŭ troviĝas, sed kelkloke iom distaŭzas ĝin ĝenaj lingvaj malglataĵoj, kiujn konscienca reviziado povus facile elsarki. Kaj estu permesita ankoraŭ unu rimarko. *Regulus* ne estas la „unua originala romano en historia kadro". La unua estis *Pro Iŝtar* de Luyken, eldonita en 1924.

La Eldonejo Gabrielli per *Regulus* certe havas sian unuan furor-libron – mi ne duĝas, ke la ŝatantoj de bona kaj amuza literaturo jam atakis ĝin...

V. *Benczik*

Distra verko pri romanoj

William Auld: Vereco, distro, stilo. Romanoj en Esperanto. Enkonduko, notoj kaj bibliografio de Reinhard Haupenthal. Eldonis: Artur E. Iltis, Saarbrücken 1981. 101 p. 21 cm.

Kvindeko da originalaj romanoj dum pli ol sep jardekoj – inter 1908 kaj 1980 – povas ŝajni ne tre granda plenumo, tamen, kiel prave skribas Auld postparole, ili estas „unu el la grandaj mirakloj de la moderna mondo." Romano estas ĉefa ĝenro en la ĉi-jarcenta literaturo, la publika opinio ordinare prijuĝas naciajn literaturojn laŭ ties roman-produktado. Poezio atingas nur tre malvastan tavolon de la legpubliko, kaj ankaŭ noveloj-rakontoj-eseoj nur malofte populariĝas.

Tial la pritakso de la valoroj de la Esperanta romano havas apartan gravecon, ja por ĝia plua evoluo nepre necesas klara orientiĝo sur la kampo

de la ĝisnunaj atingaĵoj. Kaj la esperantista leganto ricevas elstaran ĉiĉeronon en la persono de Auld, kiu en sia ekzamenado ideale kombinas tri vidpunktojn: subjektivan pretendon de leganto, ĝeneralajn literatursciencajn kriteriojn kaj specifajn kriteriojn de la Esperanta literaturo. Li trovas, ke la tri ĉefaj valoroj de romano estas *vereco* (kiu kompreneble ne signifas identecon kun efektivaj okazaĵoj, nur fidelecon al la reala vivo), *distro* (kies bazo estas la interesa, fikcia rakonto) kaj *stilo* (valoraĵo esence lingva, kiu cetere helpas validiĝi verecon kaj distron). Kvankam teorie tiu ĉi literatura triunuo povas sajni iom arbitra, por gvidilo praktika ĝi taŭgas eminente.

La verko dividiĝas je kvin ĉapitroj: 1. La romano kiel artformo; 2. La romantika romano; 3. Utopioj, satiroj, fantascienco; 4. La romano kiel distraĵo. La detektiv-romano kaj ties fono; 5. La romano kiel socia spegulo. La roman-verkisto, kiel socia kritikanto.

Ĉiu konanto de nia romanliteraturo povas konstati, ke tiu grupigo estas pli-malpli ĝusta, kaj konforma al la reala konsisto de la Esperanta romanaro. Tamen, la troa respekto al tiuj etikedoj rezultigas iujn kritikindaĵojn: la socikiritkaj valoroj de romanoj klasigitaj en la ĉapitroj 2 kaj 3 ne sufiĉe manifestiĝas, dum la iom naturalisme tedaj romanoj de Engholm kaj Weinhengst paradas kiel ĉefaj socikritikaj verkoj.

Auld ne la unuan fojon laŭdas la lingvaĵon de Varankin en la cetere bonega *Metropoliteno*. Lin ensorĉas frazoj kiel *Pelata de l' vento kun furioza sonoro trakuris la ponton tramvagono,* kiun mi bezonas unue traduki rusen, por kompreni ĝin, sed eĉ tiel la frazo memorigas al mi la Faŭst-tradukon de Barthelmess. La lingvaĵon de Varankin mi trovas nek „laborista", nek „alternativa", sed simple fuŝa, atestanta pri nesufiĉa alproprigo de Esperanto.

Vereco, distro, stilo ne celas nur specialistojn de nia literaturo, sed, antaŭ ĉio kleriĝemajn legantojn, kiuj fakte en tiu ĉi libro povos trovi ĉiujn tri Auld-ajn valorojn de romano: *verecon* de la prezento de la temo, *distron* sekvante la spritajn komentojn formulitajn per orelkaresa, tamen simpla *stilo*.

V. *Benczik*



Libro kaj scenejo

János Elem: Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? Teatraĵo. El la hungara tradukis Vilmos Benczik. Dulingva eldono hungara–Esperanta. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. 91 p. 21 cm.
Prezo: 9,90 gld
(Por Hungario 40,- forintoj)

Por ĝui poezion aŭ prozon sufiĉas la verko kaj la leganto. Por ĝui teatraĵon estas supozate havi multe pli: teatron, aktoran teamon kaj – publikon. Kiam aŭtoro verkas teatraĵon, li supozeble imagas ĝin jam sursceneje. Ĉu tial teatraĵoj estas la pli maloftaj verkoj en niaj listoj de laste aperintaj libroj?

Ĉe Hungara Esperanto-Asocio eldoniĝis ĉijare nova teatraĵo: János Elem: „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?" Forme la libreto enhavas paralele ambaŭ versiojn de la verko: originalan hungaran kaj tradukan Esperantan, pri kiu estu permesate citi opinion de Paul Thorsen: „buŝpreta traduko de Vilmos Benczik." Titolpaĝe ornamas la libron la piedsigno, venante cetere ankaŭ el la plumo de la aŭtoro. La teatraĵo aperis printempe kaj ĝiaj unuaj ekzempleroj vendiĝis kiam paralele en Teatro Radnóti okazis ĝia premiero. La recenzanto, kiu aplaŭdis al ĝi premiere, nur malfacile povas apartigi la libron de tia imago pri ĝi kian al ĝi atribuis la reĝisoro de la verko, *László Romhányi.* János Elem debutas teatre, elektante la temon en kiu li maldebutas profesie: kiel malkaŝis jam „Heroldo", la pseŭdonimo *János Elem* egalas al *Márton Lengyel* (vic-gvidanto de la Hungara Turisma Oficejo).

La teatraĵo gvidas turisman grupon al dezerto, al „granda nenio", kie ĝin simple lasas la moderna turisma entrepreno „SED NI SAME". Ekipitaj per tendoj kaj manĝaĵo, kaj kio plej ŝarĝas – libera tempo, la turistoj restas turnitaj unu al la alia.

Ni do konatiĝas kun grupo al kiu ne mankas mono nek komforto kaj kiu dum du liberaj semajnoj devas integriĝi. Tra iom nehoheraj scenoj de histerio, ordonemo, amoro kaj ordemo elprofiliĝos pluraj tipoj: *Idel,* la ŝablona turisma gvidanto, lerninta la lingvon de la grupo per magnetofono kaj parolanta ĝin sen kompreni ĝin (Esperanto-publiko sentas sin tra ĝi plaĉe alparolata), *Jeva,* flirtema sekretariino konscia pri sia korpo, entreprema *Ernestro,* kiu postulas indiĝenojn por komercumi, *Roberto,* turisma teoriulo, kiu dum la tuta tempo analizas „kompletan malkompleksecon" de la loko kien li enfalis... Fine la agentejo organizas popolfeston kun indiĝenoj, omaĝe al profeto, kiu tie vagadis. „Kaj diru, ĉu vi jam vidis la Piedsignojn de l' Profeto? Tiam, kara kolego, vi vidis nenion ankoraŭ! "

– Ĉu tiuj du semajnoj neniom efikis al vi?

– Kiel efikus ĝuste tiuj du semajnoj, ja la antaŭaj dumil semajnoj havis precizoble miloble pli da eblo efiki – replikas grupanoj revene.

– Mi atendis, ke la ekskurso montros, kiel ni vivos post cent jaroj, dudek jaroj, morgaŭ! Kiam ni malhavos financajn zorgojn, sed havos tempon kaj deziron profiti ĉion ĉi?

– Kion oni faru kun si, estante libera? – demandas Adamo, sed adiaŭo kaŝas la respondon.

Sprite Elem apudmetas nian propran turismemon.

„Ĉu vi ne volas rezigni pri via kutima komforto? Ĝiru 250 dolarojn al la konto numero 38535 de la Kreditbanko de Zürich, kaj pasigu hejme viajn feriojn! "

Lia lando estos ja nia kongrescelo en 1983 kaj ĝi ne fremdigu nin. Ni venos ne nur vidi sed ankaŭ lasi piedsignojn.

Spomenka *Stimec*

Gajdar – granda amiko de junaj legantoj

Gajdar, Arkadij: Timur kaj lia taĉmento. Trad: E.S. Pervertajlo kaj la kantojn R. Grinŝpan. Eld: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1982. 72 p. (Por Hungario 40,- Ft, por Sovetio 2,50 rubloj.)

Ne ĉiuj enciklopedioj kaj leksikonoj pri la monda literaturo mencias la nomon de la soveta verkisto Arkadij Gajdar, sed la sennombraj infanoj, kiuj legis liajn librojn, neniam forgesos lian nomon.

Tiel, kiel por la hungaraj infanoj unu el la plej ŝatataj libroj estas „La knaboj de Paŭlo-strato", kaj por bulgaraj infanoj – „Mitko Palauzov", tiel por sovetaj infanoj la plej ŝatata libro estas „Timur kaj lia taĉmento". Tiun ĉi etan romanon oni tradukis en plurajn lingvojn kaj en multaj landoj ĝi estas ege populara.

Kial „Timur kaj lia taĉmento" iĝis tiel legata kaj tiel multe tradukata? La sekreto estas en la talento de Gajdar, en lia neordinara kapablo senpere enrigardi en la delikatan infanan animon kaj atente tuŝi ĝiajn plej sentemajn kordojn.

Gajdar bone scias, ke la plej grava en la vivo de la infanoj estas la ludo – la senfina kaj alloga infana ludo, kaj pere de sia romano la talenta verkisto proponas al la infanoj interesan kaj noblan ludon.

La kuraĝa knabo Timur formas taĉmenton el infanoj kaj la celo de tiu ĉi taĉmento estas helpi al la olduloj kaj malsanuloj. La taĉmento de Timur aperas tie, kie iu bezonas helpon. La laboremaj taĉmentanoj kaŝe helpas al la homoj kaj tiamaniere la taĉmento ĉiam restas en sekreto.

En sia romano Gajdar ne predikas, ne mentoras. Li nur majstre kaj alloge priskribas la neordinarajn aventurojn de siaj heroj kaj tiel li nerimarkeble inspiras al la junuloj homamon kaj noblajn agojn. Sed eble la aŭtoro



neniam supozis, ke lia romano havos tiel vastan reeĥon. Post la apero de „Timur kaj lia taĉmento", en Soveta Unio kaj en multaj landoj, la infanoj

organizis sennombrajn Timurajn taĉmentojn.

Dum sia mallonga vivo, Gajdar verkis nur kelkajn librojn, sed ili elokvente montras, ke li estas aŭtoro kiu ne nur bone komprenas la infanan animon, sed kiu spertas krei interesajn kaj allogajn verkojn por la plej malgrandaj legantoj, kaj tio vere ne estas facila, ĉar ni bone scias, ke la plej severaj kritikantoj estas la infanoj.

Mi ĝojas, ke „Timur kaj lia taĉmento" aperis ankaŭ Esperante, ĉar tiamaniere la romano povas trafi tiujn legantojn, kiuj ne havis eblecon legi ĝin en sia gepatra lingvo, kaj pere de ĝi, ili ekkonos aŭtoron kiu sincere amis la infanojn kaj kiu plene dediĉis sian talenton al ili.

Georgi *Mihalkov*

Konstrui hejmon, patrujon

Reveno, p. 80; Blanka sablo, p. 55; Miriadoj da lumoj, p. 61. Ĉiuj el Kolekto Hibisko. Tradukistoj: Nguyen Minh Kinh kaj Sang Dinh Dam. Eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1981. (Prezo por hungaroj po 10,- Ft.)

Mi devas jam anticipe sincere konfesi, ke dum la legado de tiuj tri modestaspektaj kajeretoj senĉese ŝvebis en mi iuj ĝemelpensoj. La unua estis, ke multaj el tiuj noveloj havas siajn paralelojn en la tutmonda literaturo (plej ofte mi pensis pri Ŝoloĥov), la dua estis, ke nepre almenaŭ kelkaj el ili meritas tradukojn en la naciajn lingvojn (ni pensu nur pri la pontlingva rolo de Esperanto!)

La vjetnama literaturo post la finiĝo de la plurdekjara senĉesa, genocida milito turnas sian atenton al la profundaj homaj problemoj de la rekonstrua laboro en la lando. La plej elstaraj verkistoj nun inter la pacaj cirkonstancoj sukcesas montri la veran kruelaĵon de la milito. La ĉefheroo de la rakontoj estas ankoraŭ plej ofte soldato. La soldato, kiu ĝisvivinta la finon de la armilaj luktoj nun venas al sia hejmo, kaj per ĉiuj pensoj spertante la detruojn ja tuj devas stari preta por lukti plu kvankam jam ne plu per armiloj, sed laboriloj. La ĉiutagan heroecon de la frontoj jen anstataŭas tiu de la tutlanda rekonstruo. La rekonstruo ne nur de la konstruaĵoj, sed ankaŭ de la disŝiritaj homaj ligoj kaj de la difektitaj mondkonceptoj. La nokta bivakfajro de soldato ĵus reveninta kaj dormanta inter la restaĵoj de sia iama hejmo havas penetrajn simbolajn fortojn (Reveno).

Kaj jen reaperas en la noveloj – kiuj havas vere variajn temojn – ankaŭ aliaj ĉefherooj: edzinoj, amatinoj fidelaj kaj malfidelaj, fratinoj sennomaj, kies dummilita heroeco evidentiĝas nur nun post la landpereigaj bataloj.

Kio estas komuna en ĉiuj rakontoj, tio estas la sopiro al la paco, al la pli homa krea vivo, al la forigo de ĉiuj suferoj.

La malgrandaj kajeretoj meritas la tralegon, eĉ la relegadon, kvankam la lingvaĵo estas foje-foje stranga. Kiel grava problemo aperas la mankanta terminaro por la specife vjetnamiaj fenomenoj – ni kuraĝigas la tradukistojn enkonduki por tiuj nocioj en Esperanto ĝis nun ne ekzistantajn novajn vortojn kaj glosi ilin. Samtempe ni proponas aperigi kelkliniajn biografietojn pri la verkistoj de la noveloj, esperantistoj ja rigardas tuj sia propra riĉaĵo la ĵus tradukitajn verkojn kaj volonte havas informojn pri la verkistoj.

Ni gratulas niajn vjetnamiajn kolegojn pro la persista laboro sur la tereno de la libroeldonado kaj ni deziras al ili ankoraŭ multajn Esperanto-librojn, sukcesplenan patrujkonstruadon kaj pacon por ni ĉiuj.

Imre *Szabó*

Interesaj rememoroj

Georgo Dimitrov – pri Esperantomovado kaj pacbatalo. Rememoroj de Nikola Aleksiev. Eldonis: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1982. 48 p. 13x17 cm. Ilustrita.

Je la centjara jubileo de la elstara antifaŝista batalanto, kies aktivado estas tutmonde konata – precipe lia admirinda, triumfa konduto dum la fama Lejpciga proceso – estis inde eldoni tiun libreton. Alivorte: estis inde refreŝigi la memoron de gravegaj okazintaĵoj kaj de grandioza karaktero. Aleksiev mem partoprenis en gvida rolo la kampanjon siatempe por subteni la defendon de la Lejpcigaj akuzitoj. Tiuj kampanjoj tutmonde kunfandiĝis kun la publika rifuzo de la bruna Hitlera pesto kaj kun la unuigo de la kontraŭfaŝismaj fortoj. Aliflanke, la por-faŝismaj fortoj bone komprenis tiujn intencojn, sekve ili kruele kontraŭbatalis la protestantojn kaj manifestantojn kontraŭ la kalumnia proceso. La libreto per atentokapta maniero rakontas, kiel agis la persekutitaj kaj malliberigitaj kontraŭfaŝistoj (baldaŭ en la ĉelo trovis sin ankaŭ Aleksiev kiel redaktoro de laborista E-revuo). Aparte interese estas legi pri la tagoj de Dimitrov en la malliberejo, kiujn li zorge utiligis por studi la germanan historion, ne preterlasante la plej gravajn germanajn filozofojn. Dum la proceso, antaŭ la monda publiko, Dimitrov ĝene surprizis la naziojn ankaŭ per siaj konoj, per trafaj komparoj koncerne historion kaj politikon de la germanaj (kaj de aliaj) landoj.

Kun fotodokumentoj konigas la libreto la karieron de la modela revoluciulo antaŭ kaj post la triumfa proceso. Lian subtenon al la Internacia Lingvo montras pluraj eldiroj koncerne agojn de la bulgara E-movado, li konsideris grava ankaŭ la internajn fadenojn de nia movado al la vasta mondo. Pli bone estas konataj liaj luktoj por krei tutmondan solidarecon de ĉiuj kontraŭmilitaj fortoj, fortikigi la pacmovadon por malhelpi la disvastigon de la milita fajro. La aŭtoro en leginda maniero, koncize prezentas la rememorojn, kvankam foje li ne povis eviti certan patoson aldone al la, per si mem forte impresantaj, agoj kaj trajtoj de tiu popola kaj populara heroo.

Ervin *Fenyvesi*

Dulingva poemaro

Julius Balbin: Strangled cries. Eldonis: Cross-Cultural Comm., New York, 1981. 24 p. 21x14 cm.
Prezo: 2,50 US. dolaroj

Belaspekta volumeto kun Esperantaj poemoj altiras atenton de Usonanoj rigardantaj montrofenestrojn de librovendejoj, ĉar ĝi „krias" angle! Tamen ankaŭ *Esperante,* ja la poemoj de la konata Esperanta poeto tie troviĝas en du lingvoj: la anglan tradukon faris Ch. *Rizzuto,* konata Nevjorka poeto kaj verkisto, kiu trovis indaj la E-ajn poemojn respeguli en sia gepatra lingvo. Laŭ tiea kutimo iel neglektiĝas la variaj versformoj de Balbin, la tradukoj pli klopodis arte interpreti la pensojn, trovi la paralelojn de la originalaj: kriaj esprimoj, sufere transaj el la naziaj ekstermejoj.

Ervin *Fenyvesi*

RETRORIGARDO

Vi certe posedas la unuan numeron de H.V. en tiu ĉi jaro. Se vi atente legas ĝin, vi certe facile solvos nian krucenigmon. Certaj vortoj en ĝi troviĝas sur la paĝoj de la n-ro 1982/1, foje ni indikos ankaŭ la paĝojn. Paciencan serĉadon kaj bonan amuzon!

Horizontale: 1. aranĝo en Budapeŝto kun E-aj programeroj (R) 7. Konatiĝis kun Eva dum Silvestra balo

Horizontale: 1. Printempa aranĝo en Budapeŝto kun E-aj programeroj (R) 7. Konatiĝis kun Eva dum Silvestra balo (p.32) 12. Grupo da virinoj (R) 13. Edzino de dio Kronos 15. E-mondorganizo, miksite 16. Nomo de fridujo en anonco 18. E-klubo kies prezidanto estis Hor.25. 20. Ilo 22. T. Sawyer 23. Soldatino en la dramo (p.7) 25. Grandioza poeto-tradukisto de Tutmonda Sonoro 28. Returne 30. Sengepatra 32. Ordone, direktante (ankaŭ: hungara urbo inverse) 33. Hundo de la lerta Tinĉjo 35. Maniero de elparolo 38. Mondorganizo de ŝtatoj miksite 39. Persona pronomo vira 40. Komenco de montraj pronomoj 42. Sur la titolpaĝo rigardas verkojn de Hor.25. 46. Bildromano 49. Sufikso por la sekvaj generacioj 51. Parto de maro, inter paralelaj bordoj (R) 53. Balanci infaneton por dormigi (R) 54. Japanaĵo en „Revuo de revuoj" 56. Aŭdaca vojaĝanto de Swift kaj Szathmári 59. Freneziĝinta Romia imperiestro (--217), fine ...lo 61. Portanta subo de objekto 62. Ĉiam meze de H.V. 64. Dez. koresp. pri skoltismo ŝi el Venezuelo 67. Tia estas kredo aŭ kulto de statuoj 69. Komenco de Okcident-Eŭropa metropolo 70. Aktorino, E-deklamanto dum Hor.1. 71. Sen artikolo troviĝas inter „E-aj libroj..." 76. Grekdevena virinnomo (origine: „paco") 77. Nepra farendo (R) 78. Gaso, uzata por lumreklamiloj 79. ...en ambulanco (gajpaĝe)

Vertikale: 1. Muzika, koncerta societo 2. Interne 3. Ega dezerto en Afriko (R) 4. Altagrade, ege 5. Parto de kurbo 6. Rabobesto, unua parto! 8. Enkondukas ankoraŭ ne uzitajn vortojn 9. Ekzistas tia -alumino 10. Sur foto: laŭtlegas poemon de Kalocsay 11. Verbofinaĵo „venonta" 14. Ĉefurbo de Turkio 17. Mezurunuo por likvaĵoj (kapacita) 19. Regiono en oriento de Araba Duoninsulo 21. Venas el vulkano 24. Industria Organiza Unio 26. Travidebla disko deviiganta lumradiojn 27. Centonon signifanta mezur-vortero 29. Unu germane 31. Uzi por speciala celo (R) 34. Fasko de radioj perceptata de okuloj (R) 36. ...alto, fama ponto en Venecio 37. Laŭ ripetiĝantaj egalaj periodoj 41. Poemo de John I. Francis 43. Seksa-pasia amo 44. Albigensismo, religio de la „puraj" en Sud-Francio, 13 jc 45. En ŝakludo samtempa movo de turo kaj reĝo (R) 46. Societo de e-istoj, sportistoj k.a. (R) 47. Speco de greno, gravega por bredado, adjektive 48. Ne sube (prep.) 50. Haven-basena, por ŝipon ripari 52. ...aden, provinco en Etiopio 55. Parton de la ĉemizo 57. Bezonanta ripozon (R) 58. Reeldoni la enhavon de la stomako (R) 60. Alkala reakcia radikalo, NH_4 62. Impona lukso 63. Konjunkcio por kompari malegalajn 64. Lirika formo, uzata de Horacio 66. Farante kiel V.73. 68. Presita sciigo ekz. sur muro (R) 72. ...lizi 73. Saltema eta ambifio (R) 74. Mal-jes 75. Kokina produktaĵo

(Adamo *Zabek*)

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo. Ensendendaj: **Hor.** 1, 7, 18, 23, 33, 42, 56, 62, 70, 79. **Vert.** 1, 8, 26, 31, 43, 55, 60, 66.



SOLVOJ

de la krucenigmo en n-ro 1982/2: ...loĝados en la utopia domo – Sekura estos li, sed senpasia – Ebleco sola por ĉi homamaso.

Libropremion gajnis: *Eva Benická,* Košice, CS: *Fedotov N.* Taŝkent, SU-Uzbekistano; *Jan Szurman,* Dzierôniów, PL.

de la „Ekzameno" en n-ro 1982/2: 1. La vera nomo de Mark Twain: Samuel Langhorne Clemens; 2. La indiano Joe mortigis la doktoron; 3. ...pruviĝis, ke – la teruran krimon faris Muff Potter.

Libropremion gajnis: *Anna Dorosz,* Radom, PL; *d-ro Ferenc Hegedüs,* Oroszlány, H.

Ni memorigas la solvantojn, ke la lotumadon partoprenas ankaŭ la iom malfrue alvenintaj solvoj de la antaŭa numero (precipe se tiuj venas el malproksimaj lokoj).

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La knaboj de Paŭlo-strato
Ferenc Molnár

„La knaboj de Paŭlo-strato" estas unu el la plej ĉarmaj romanoj en la porinfana literaturo. Ĝi estas vaste konata ne nur en Hungario kaj ĝin legas ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj. Tiu ĉi romano cetere viciĝas inter la plej bonaj tradukitaj verkoj en Esperanto.

1. Per kiu frazo finiĝas la manifesto, verkita de Boka?
2. Kiu diras la sekvajn vortojn: „...de kiam ni fondis la societon, ĉiu jam iĝis oficiro, nur mi estas ankoraŭ infanteriano, kaj al mi ordonas ĉiu... kaj ĉion mi devas fari... kaj... kaj..."
3. Kian metion havas la patro de Nemecsek?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Leterkesto

Hector Boffejon, Sempach I.Z., Svislando: Nia malnova abonanto esprimis sian kontenton pri enhavo kaj lingvo de H.V. – tre dankinde niaflanke, tamen ni intencas ilin laŭgrade plibonigi! Koncerne ankoraŭ dubajn vortformojn (villo–vilao, k.a.) sen trudi al la kunlaborantoj certajn variantojn, ni allasas la rajton elekti por si la pli plaĉan. Ni plene konsentas kun vi, ke nek PIV, nek okaza uzo de Zamenhof pravigas iun el la variantoj. Juĝos la publika uzo, kiel jam multfoje dum nia historio, kaj tion sekvu la sigelo de nia akademio. Koncerne *vortformojn* la homogeneco ne estas nepra postulo en revuo laŭ nia opinio. Male, pri *gramatikaĵoj* estus plene maleble lasi diversajn kontraŭdirajn praktikojn, se oni ne volas konfuzi la publikon. Do *kiun sekvi* okaze de disputo? Fakte: ĉe la kunmetitaj verboformoj? Lingva disciplino estas necesa ankaŭ por la klareco de la tekstoj; kaj samkiel akademia aŭtoritato servas por naciaj lingvoj, nia E-Akademio se jam decidas – ni plenvolonte kaj per disciplino sekvas. Estus tre malfavore por nia movado, se oni alie... Ni esperas vian samideanan komprenon.

Huzimaki Ken'iti, Tokio, J.: La eldona agado de HEA ne malofte renkontas agrablajn eĥojn, precipe pri „pluvivo" de niaj eldonaĵoj. Lastatempe venis ekzemple tia informo, nome la novelkolekto de Sándor *Szathmári* (Mašinmondo), estis ĉinlingve eldonita. Nia libro, „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" instigis vin traduki el ĝi la studon de *Podkaminer:* Socialismo kaj Internacia Lingvo, kaj publikigi ĝin en gazeto de progresemaj sociaktivuloj. Ni havas la esperon, ke ĝi taŭge kontribuos akiri en tiuj medioj pli da simpatio kaj kompreno al IL. Danke ni kvitancas la senditajn ekzemplerojn.

Spomenka Štimec, Vel. Gorica, YU: La salutojn kaj plezuresprimojn ni transdonis al la geaktoroj de la printempa Renkontiĝo de E-Teatroj, kaj aparte al „soldato Gurviĉ", Athina *Papadimitriu,* kiu kun majesto kreis sur la podio tiun volontulinon. Nia saluto nun flugu al vi kun niaj dankesprimoj.

Dante Bertolini, Lokarno, Svislando: Inter la alvenintaj laŭdaj rimarkoj pri la recenzo de W. *Auld* (Tutmonda Sonoro) en H.V. n-ro 1982/2, ni prenis la vian por publike kun danko mencii ĝian plenan aprobon kaj superlativojn. Certe, ne ĉiu numero de la revuo povas publiki tiel altnivelan kaj interesvekan eseon, vere decan al la recenzita poeto, al Kalocsay. Via itala traduko-provo de Utopio almenaŭ al ni plaĉis – eventuale ankaŭ al ĝia poetino Rejna *de Jong* – ĉar „kazohinion" vi instinkte „saĝe komprenis". Ne dubinde, vi havos grandiozan renkonton kun Szathmári dum legado de lia utopia, tamen pri ni parolanta romano. Pluajn tradukajn sukcesojn al vi!

Ilija Andreev, Šumen, BG: Plezure ni legis, ke la fakultativa E-instruado nur en Šumen tiris al si tri lernejojn, ja per tiu registara decido Bulgario denove antaŭiras inter la landoj. Koncerne la komune eldonotan E-gazeton de socialismaj landoj, ni povas – denove – nur aludi la konatajn interlandajn malfacilaĵojn, kiuj nepre malhelpus taŭgan redaktadon de tiaspeca gazeto. Internacia gazeto cetere ne sukcesis eĉ en ekster-esperantistaj medioj ĝis nun, do oni povas serioze dubi pri realeco de tia plano. Alia, sed eĉ ofte pli malfacila afero estas la plimultigo (?) de fakaj E-revuoj, kio devas esti afero kaj entrepreno plej unue de la koncernaj fakaj medioj. Ĉe ili necesas fortigo kaj firmigo.

Osmo Buller, Oulu, Finnlando: La finna ĵurnalo (kiu publikigis vian tradukon de nia artikolo pri la Hungarlanda ekonomia regulsistemo) ricevu nian kolegecan saluton pere de vi. Certe vi bone konscias pri la eksterordinara graveco de similaj „importadoj", kiam krom la efektiva temo estas diskonigata ankaŭ la fonto, esence la Internacia Lingvo kiel ponto servanta praktike la publikon. La senditan finnlingvan artikolon ni amike dankas, kaj aŭguras al vi pluajn sukcesojn, por kiuj prezenti bazon ankaŭ restas devo de nia redakcio.

Korespondi deziras

S-ino Kai *Tennisberg* (26) kuracistino serĉas korespondgeamikojn. SU-Estonio, Haapsalu rajoon, Parila 3-13. – F-ino Todorka *Georgieva,* ktm, pĉt, *Šumen,* str. Vihren 6, ap. 22. BG–9704. – S-ino Tanja A. *Hristova,* ktm, pĉt, *Šumen,* ul. Trakija 1, ap. 6. BG–9704. – S-ino Martine *Harp* (33) kaj filo Valéry (13) kun samaĝaj ges-anoj en Hungario, Rumanio aŭ Bulgario, pĉt. Kol. pm. *Le Havre,* 215 avenue du 8 mai, F–76610. – S-ro Umid *Raĥmatullin* (28) kuracisto, ktm, pĉt, *Samarkand,* Vinogradnaja 4, SU–703 021. – S-ro *Körmöczy* Antal (25) kun gejunuloj tutmonde pri div., kol. pk. *Kanjiža,* Solunska 18, YU–24420. – F-ino *Kasperaviĉiūte* Edita (16) pri sporto, turismo, muziko, lingvoj kun gejunuloj tutmonde. *Vilnius,* Antakalnio 58-22, Litovio SU–232 055. – F-ino *Duonelaitė* Virginia (15) pri lingvoj, sporto, turismo, filatelistino. *Palanga,* str. Vitauto 80-6. SU–235 720. – S-ro Rumen R. *Dimitrov* (34) pri libroj, ekskursoj, kun hungaroj. *Sofio,* str. D. Poljanov, BG–1504. – S-ro José Carlos *Barbosa* (30) fraŭlo, ktm, pĉt, *Niterói,* Travessa Jupira 34, Brazilo 24–110. – S-ino Vilja *Pommere* kun multflankaj interesoj, kol. ins., emblemojn, pm, pk. *Ergli,* Lenina 25, Latvio SU–229 240. – S-ro Laĉezar J. *Georgiev* (27) krupiero, pĉt, precipe aŭtoturismo, muziko, sporto. Respondas certe. *Sofia,* poŝte restante, BG–1202. – S-ro *Pucz* József (23), universitatano ktm, pĉt, *Budapeŝto,* Zichy J. u. 40. f.1. H–1066. – S-ino Claude *Chemin* (41) profesoro pri historio, kun samaĝa esperantist(in)o en Hungario, Bulgario aŭ Rumanio pĉt. *Montivilliers,* route Payenniére, F–76290. – S-ro Ilija *Andreev* ktm, pĉt, *Šumen,* pk. 120. BG–9700. – S-ro Zbigniew *Tomkiewicz,* fraŭlo, kol. Eaĵojn, respondas certe. *Wschowa,* str. 1-Maja 5/2. PL–67-400. – S-ro Jens *Merker* (17) lernanto pri mod. muziko, literaturo, turismo k.a. kol. bk. *Cottbus,* Bautzener str. 12, DDR–7500. – F-ino Virginia *Rakuizaitė* (21) kun pacamaj amikoj, int. arthistorio, arkeologio, speleologio, naturprotekto. *Kaunas,* pk. 175. Litovio SU–233 000. – Kolektas „unuajn lernolibrojn de legado" el diversaj landoj, s-ino Sonja *Holmedal, Nykoping,* Tegelwägen 4c. S–61150, Svedio. – *E-Klubo* ĉe uzina kulturdomo dez. konĵaktiĝi kun kluboj, grupoj ĉe kulturdomoj por kolektive kaj individue korespondi, interŝ. spertojn, materialojn, ev. kontaktigi siajn kulturdomojn, kaj rec. vizitoj. Kol. pk pri monumentoj de Kossuth kaj Dimitrov. Kombinat Aluminij „Stamenov", Dom Kulturata, Klub Esperantista, *Šumen,* BG–9700.

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Judit Somhegyi.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, d-ro Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. 149, H–1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor Vaskó.

Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704

ORION TV RADIO

AT 3961

JUNIOR



61 cm

M
modul system

65
WATT

- Nova membro de la sukcesa serio URANUS
- Kurtvojaj, novsistemaj selektobutonoj
- Aparato taŭga por programi ok staciojn
- Ekonomia energiokonsumado
- Konektiloj por kapaŭdiloj kaj magnetofono
- Teknikaj indikoj haveblas en aparta prospekto

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÄV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.

5 jan 1983